

[noto]

Eldonita en 1971 de la eldonejo en Vjetnamio

La teksto enhavas multajn gramatikajn kaj terminajn erarojn aŭ dubindaĵojn; plejparte da ili ne estas korektitaj pro konsidero pri la fakto, ke ĝi estas historia dokumento. Ankaŭ kelkaj propraj nomoj, kiuj estas transskribitaj el la sanskrita aŭ la japana, ne estas ĝustaj, sed mi ne povas scii, kiu ĝi aŭ li estas; do ili restas sen tuŝo. Nur evidentaj tajperaroj estas korektitaj.

(Yamaguti Sin'iti, ĉefdirektoro de Japana Budhana Ligo Esperantista)

[pri la tradukinto/aŭtoro - el Vikipedio]

T. T. ANURUDDHA (naskiĝis la 27-an de majo 1915, mortis la 5-an de novembro 1980 en Noumeo (Nov-Kaledonio) estis multjara prezidanto de Budhana Ligo Esperantista.

Kvardek jarojn esperantisto. Naskiĝinte en Bonno kiel Rudolf Petri, li fariĝis unu el la plej konataj budhanoj de eŭropa deveno. Lia kredo lin kondukis tra tre multaj landoj; li longe loĝis interalie en Barato kaj en Vjetnamio, kie li pasigis naŭ monatojn en malliberejo.

Li estis konata inter budhanoj kiel verkisto kaj lingvisto. Du el liaj tradukoj aperis en Esperanto: "Tiel parolis la Budho kaj liaj disĉiploj" (1971) kaj "La vojo al Nirvano aŭ la Dhammapado" (1973).

TIEL PAROLIS LA BUDHO

KAJ LIAJ DISĈIPLOJ

DE
T. T. ANURUDDHA

*Unua eldono
1971*

*Ĉiuj rajtoj rezervitaj
de la aŭtoro*

*Eldonita de la Bô-Tát Csoma Instituto por Budhologio,
P. . Box 34, Vŭng-Tău, S.Vjetnamio*

*En memoro
de
F-ino Margo Bowden
(Upasiko Sari)
Neforgesebla Sekretariino
de la
Budhana Ligo Esperantista*

Enkonduko

La Bô-Tát Csoma Instituto por Budhologio apud Vŭng-Tău en Sud-Vjetnamio havas la plezuron prezenti al la budhanaro kaj esperantistaro kolektadon da stancoj, versoj kaj aliaj valoraj diraĵoj de la Budho kaj de kelkaj de Liaj disĉiploj. Ĉi tiu libreto estas nia unua eldonaĵo en Esperanto kaj ni esperas ke pluraj povos sekvi sporade. La celo de tiu ĉi libreto estas doni al esperantistoj simplan enkondukon al Budhismo, la plej disvastigita filozofireligio de Azio, kaj fakte ankoraŭ la plej vasta religio en la mondo. Ĉiuj tradukoj de la kolektado da stancoj ktp. estas faritaj el la palia, sanskrita kaj angla lingvoj. Dankon ni ŝuldas al la jam mortinta sekretariino de la Budhana Ligo Esperantista, kiu inter la jaroj 1949-1955 de tempo al tempo gastigis la kompilinton kaj tradukinton kaj donis al li bonajn konsilojn rilate al tradukoj el la angla lingvo. La unua, kruda manskribaĵo estis travidita kaj iom parte korektita de S-ro G. Yoxon, pro tio dankon ankaŭ al li. Benojn kaj dankojn al kelkaj vjetnamaj kaj eŭropaj amikoj kiuj mone subtenis la eldonigon de "Tiel parolis la Budho". Finan dankon ni ŝuldas al s-ro Nguyễn-phước-Khảng el Sajgono kiu bonvole transprenis la taskon kontroli la multobligadon.

Pro la terura milito kiu jam pli ol 24 jaroj furiozas en Hindaĉinio kaj precipe en Sud-Vjetnamio, ni bedaŭrinde ne kapablas eldoni presitan libron, sed ni esperas ke post la milito la situacio ŝanĝos je la pli bono.

Personoj, kiuj eventuale deziras konatiĝi kun la Budhismo pli profunde povos mendi la librojn listigitajn je la fino de tiu ĉi libreto. Ni donis nur la titolojn de la plej bonaj libroj kaj kiuj respegulas la originan Budhismon.

Vŭng-Tău

la 16 decembro 1971

D-ro T.T.-Anuruddha

direktoro de la Instituto

Tiel parolis la Budho:

“Ne kredu ion pro onidiro;
ne kredu tradiciojn ĉar ili estas aktualaj kaj hereditaj tra generacioj;
ne kredu ion pro ĝia famo aŭ al io ĉar homoj multe parolas pri ĝi;
ne kredu ion pro tio, ĉar oni montras la skribitan ateston de Saĝulo el la pasinto;
neniam kredu ion kion vi supozas esti je ĝia favoro, aŭ ĉar la kutimo de multaj
jaroj vin inklinigas rigardi ĝin kiel vera;
ne kredu ion sole pro la aŭtoritateco de la instruistoj kaj pastroj.

Sed se, post persona sperto kaj elprovado, vi trovas, ke ĝi servas al via propra bonfarto kaj ankaŭ al la bonfarto de ĉiuj aliaj estaĵoj, al la fino de suferado, al paco de la menso kaj al Nirvano tion akceptu kiel Vero, kaj vivu laŭ ĝi !”

Brahmo¹ Sahampati petegas la Budhon:

1. "Proklamu la Dharmon², Sinjorego-gvidanto!
Turnu la radon de la Dharmo!
Batu la tamburon de la Dharmo!
Surverŝu la pluvon de la Dharmo sur la mondo!
Prediku la belsonan predikaĵon!
Elmontru la Dharmon, kion ni bezonas!
Savu miriad-dekmilionojn da estaĵoj!

el: Saddharmapundarika sutro

2. Mi, ho fratoj, estas libera de ĉiuj katenoj, de diaj kaj de tiaj homoj. Kaj vi ankaŭ, ho fratoj, estas liberaj de ĉiuj katenoj de diaj kaj de tiaj homoj. Iru, ho fratoj aparte por la bono de multaj homoj, por la feliĉo de multaj homoj, pro kompatato por la mondo, por la bonfarto, beno kaj feliĉo de dioj kaj homoj!
3. Fratoj, instru la Dharmon, kiu estas aminda je la komenco, aminda en la mezo, kaj aminda je la fino. Klarigu laŭ spirito kaj litero la Dharmon, kiu estas komplete plenumita kaj entute pura. Ekzistas estaĵoj kun nur iomete da polvo en iliaj okuloj; se ili ne aŭdos la Dharmon ili pereos; sed se ili estas studentoj de la Dharmo ili profitos. Kaj mi, ho fratoj, volas iri al Uruvelo por tie instrui la Dharmon.

el: Mahavaggo

4. Multaj nepraĵoj en tiu ĉi mondo estas similaj al sonĝoj kaj fantomoj; se oni komprenas ilin, kiel sonĝojn kaj fantomojn, tiam ni neniam seniluziĝas.

¹ Brahmo: Hindua dio

² Dharmo : la Leĝo, Normo, religio; la doktrino de la Budho.

Vidu la liston pri la teknikaj terminoj je la fino de la libreto.

el: Avatamsako

5. Li, kiu gastigas en sia koro la amon al la Vero vivos kaj ne mortos, ĉar li trinkis la akvon de la senmorteco.

el: Milindo-Panho

6. Li, kiu nenion aŭdis, nenion komprenis,
tiu homo maljuniĝas laŭ la maniero de bovoj;
lia ventro kreskas pli kaj pli;
sed lia kompreno neniam kreskos.

el: Theragatho

7. Oni ne laŭdu la faritan bonagon;
ne laŭdu ion kio ne estas farita.
Homo, kiu sen kaŭzo parolas kaj laŭdas
estos riproĉata de saĝuloj.

el: Theragatho

8. La lotuso kreskas sur pura, seka tero; ĝi kreskas en malpura akvo.
Same la Budha-naturo ne evoluigis per nenion fari, sed el la konfuzo de
vulgaraj mond-aferoj ĝi evoluigis.

el :Juima-kjo

9. La racia naturo de la homo estas radio de la vera lumo; ĝi estas la unua paŝo
sur la altenkondukanta Vojo.

el: Mahavaggo

10. La menso gvidas ĉion, kaj se oni konas la menson, oni povas ekkoni ĉiujn
aferojn; ĉar ĉiuj mondaj aferoj estas kreitaj pere de la menso.

el: Praĵnaparamita sutro

11. Kvankam homo malbone agis
se li ĉesas kaj ne ripetas
li briligas la mondon same kiel luno
kiam la nuboj malaperas.

el: Anguttara sutro

12. Se vi renkontiĝas kun persono de spirito bonvoleca, saĝa kaj studema,
samnivela kiel vi, elektu tiun homon por esti via vera amiko; bonaj amikoj kaj
benoj iradas en kompanio.

el: Ĵatako

13. La kuracisto donas sian medikamenton laŭ la naturo de la malsano; same la Budhoj instruas la estaĵojn laŭ ilia kompren-kapablo.

el: Lankavatara sutro

14. Tio, kion ni nomas Karmo estas nur penso; ĉar pensinte, homo agas per la korpo, parolo kaj menso.

el: Kathavatthu

15. En kvar manieroj estas la nura parolanto falsa amiko: Li estas laŭdema pri pasintaj aferoj, pri estontaj aferoj, li simpatias kun senvaloraj aferoj, kaj asertas, ke li estas malfeliĉa ĉar li ne povas fari ion se oni petas helpon en la nuno.

el: Digha Nikajo

16. La homo, kiu paŝas sur la Nobla Vojo vivas en la mondo; tamen lia koro ne estas plenigita kun mondaj deziroj.

el: Mahavaggo

17. Se la menso estas pura, oni vidas la Budhojn; sed se la menso estas malpura, oni certe ne vidas la Budhojn.

Kukai, fondinto de la japana Ŝingon sekto

18. Neniu forpelu aliulojn aŭ pensu ielmaniere malbonon pri aliulo. Neniu deziru, pro kolero, la malbonfarton de aliulo.

el: Khuddaka-patho

19. Malsaĝa homo proklamas siajn kvalitojn; saĝa homo tenadas ilin sekreto en si mem.

20. Pajlo glitas sur la surfaco de la akvo; sed, vera juvelo metita sur ĝi subakviĝas.

21. Multe da parolo estas la kaŭzo por danĝero; silento estas la rimedo por eviti malfeliĉon.

tri tibetaj proverboj

22. La potenculoj, kiuj konkeras la mondon, kaŭzante viktimojn ĉiulande, kiel malriĉaj ili ja estas en siaj koroj se la bonvoleco ne estas konata al ili.

23. Kiu nek mortigas nek vundas kaj ankaŭ ne postulas tion de aliuloj, sed pritraktas ĉiujn amplene, ja li ne havas malamikon, pro kiu li devus timi.

24. Nek plendu, nek konfuziĝu! En ĉiuj aĵoj karaj kaj amindaj, troviĝas la naturo de ŝanĝo, disiĝo kaj melkonstanteco.

tri stancoj el: Itivuttako

25. Ekzistas kaŭzo, kiu gvidas al la aŭskultado de la vera Leĝo (Dharmo), nome: asociiĝo kun bonkoraj amikoj. La kaŭzo, kiu gvidas al la asociiĝo kun bonkoraj amikoj estas la kredo. Kredo en si mem havas du kaŭzojn, nome: aŭskulti la Dharmon kaj pensi pravajn pensojn.

el: Nehan-kjo

26. Pura akvo reflektas ĉiujn aĵojn, kiuj venas en ĝian proksimecon. Kun malpura menso oni eĉ ne povas vidi la ombron de la Budha-Dharmo.

el: Kegon-kjo

27. Kvankam oni aŭdas, sed ne komprenas kaj praktikas tion kion oni aŭdas, estas same kvazaŭ oni aŭdas nenion. Ne gravas nur aŭdi pri nutraĵo, la stomako tamen ne kontentiĝas pro tio.

el: Lankavartara sutro

28. Li, kiu vekas en si bonvolecon kaj fluigas ĝin en la senlimecon, tiu liberiĝas de mond-ligiloj; kaj ne plu li estas katenita. Jam tiu homo estas bona, kiu kun klara menso, donacas bonvolecon al unu estaĵo. Sed tamen kiom multe pli valoras li, kiu amplene, kun bonvoleco pensas al ĉiuj estaĵoj!

29. Kiu ajn iradas kun sincera koro por rifuĝo al la Budho, Dharmo kaj Sangho li faras oferaĵon, kiu portas fruktojn kaj profiton.

du stancoj el: Digha-Nikajo

30. Ni prenas rifuĝon en la Budho ĉar li estas nia granda instruisto. Ni prenas rifuĝon en la Dharmo ĉar ĝi estas nia bona Doktrino. Ni prenas rifuĝon en la Sangho ĉar ĝi estas nia plej bona akompanantaro.

el: Ŝu-ŝo-gi

31. La Nirvano estas tiu intelekta stato kiu estas ne-videbla, senlima, la albordiĝloko al ĉio.

el: Digha-Nikajo

32. Nenie ekzistas loko kie situas la Nirvano, tamen tiu Nirvano vere ekzistas; kaj homo kiu iradas prave kun diligenta klopodo eniros Nirvanon.

el: Milinda-Panho.

33. Kasteloj kaj hom-amasitaj urboj estas lokoj en kiuj vi nun ŝatas restadi; sed memoru, ke ili falos en ruinojn, post kiam vi forlasis ĉi tiun teron!

34. Fiero kaj vanteco estas la allogoj kiujn vi nun amas sekvi; sed memoru, kiam vi estas mortinta, ili ne oferas al vi nek protekton, nek rifuĝejon!

35. Familianoj kaj parencoj estas nun la homoj kun kiuj vi ŝatas vivi; sed memoru, ke vi devas ĉiujn postlasi kiam vi forpasas el tiu ĉi mondo!
36. Servistoj, riĉaĵoj kaj infanoj estas la aĵoj kiujn vi nun ŝatas posedi; sed memoru, ke dum la tempo de via morto, viaj malplenaj manoj povos nenion kunpreni!
37. Energio kaj sano estas nun plej karaj al vi; sed memoru, ke en la momento post via morto, via kadavro estos pakita kaj forportita!
38. Nuntempe viaj sens-organoj ankoraŭ estas klaraj, via karno kaj sango estas fortaj kaj energiaj; sed memoru, ke en la momento de via morto ili ne plu estas je via dispono!
39. Dolĉaj kaj bongustaj manĝaĵoj estas aĵoj kiujn vi nun amas manĝi; sed memoru, ke dum la momento de via morto via buŝo fluigos salivon!
40. Se mi pensas pri ĉi ĉio, mi ne povas alie ol sekvi la Instruojn de la Budho. La amuzaĵoj kaj plezuroj de tiu ĉi mondo ne havas allogon por mi.
41. Mi, Milarepo, kantis pri la Ok Memorirdaĵoj, en la gastdomo de Garakhaĉo apud Gang'. Per tiuj klaraj vortoj mi donis helpantan averton; Mi urĝas vin observi kaj praktiki ilin!
el: Centmil-Kantoj de Milarepo, la plej granda tibeta jogulo.
42. Li, kiu serĉas bonecon sen saĝeco, estas kondamnita iri flanken.
Li, kiu havas saĝecon, sed ne serĉas bonecon, certe baldaŭ serĉos bonecon.
Dogen Zenĵi, fondinto de la japana Soto-Zen sekto
43. Evitu falsan doktrinon! Ne adoru, nek ĉielojn nek servu al spiritoj aŭ dioj! Kaj ne tenu vian menson al fortun-tagoj!
el: Hanŝu-kjo
44. La Budhoj celas malfermi la okulojn de la vivantaj estaĵoj al la vera Budha-scio; tiel, ke ili povu atingi la puran Vojon.
el: Saddharmapundarika sutro
45. Studado estas bona, sed tamen ne sufiĉas. Vera saĝo nur povas esti akirata per praktikado. Praktiku la Dharmon por ke viaj kunfratoj fariĝu kiel vi!
el: Mahavaggo

46. La Budho Ŝakjamuni' estas trovebla en la propra menso, same estas ĉiuj aliaj Budhoj. Esploru kio estas la menso; farante tiel, vi vere montras vian dankemon al la Budhoj.
el: Ŝu-ŝo-gi
47. Ĉio, kio estas kreita el pasioj, kolero, maldiligenteco kaj dubemo ne daŭros. Ĉio, kio estas kreita el senmemeco, amo kaj pacema menso, kaj ĉio kreita el la Budha-Dharmo neniam pereas.
el: Khuddaka-patho
48. Homo, kiu indulgas sin memame, povas esti kunulo de iu alia persono tiom longe kiel li konsentas kun li. Se li malkonsentas, tiam li malamas la aliulon. La malamo eĉ kreskigas lian ne-scion; sed se li serĉas la Dharmon, li ne falos en malamon.
el: Engaku-kjo
49. Kio estas boneco kaj kio estas grandeco? Sekvu la Vojon kaj tenu al tio kio estas vera; tio estas boneco. Se la volo estas en harmonio kun la Vojo; tio estas grandeco.
el: La sutro de 42 sekcioj
50. Tramigrante spirite ĉiujn direktojn, oni tamen trovas nenion, kio estus pli valora ol la propra memo, tiel amata al homo estas la propra memo. Pro tio, li kiu amas la propran memon, ne vundu alian!
el: Samjutta-Nikajo
51. Li, kiu estas la venkinto memoru pri la malkonstanteco de ĉiuj mondaj aferoj. Lia sukceso povas esti granda, sed kvankam granda, la rado de la fortune povas turniĝi denove, kaj tiri lin malalten en la polvon.
el: Milinda-Panho
52. Same kiel patrino gardas sian solan infanon dum tiel longe, kiel ŝi vivas; same oni devus kulturi en sia menso ĉion-ĉirkaŭantan amon al ĉiuj estaĵoj.
el: Sutta-Nipato
53. La jenaj kvar specoj da amikoj devus esti konataj kiel bonaj: la amiko kiu estas helpema; la amiko, kiu restas same dum aŭ felico aŭ malfelico; la amiko, kiu komprenas tion, kio estas valora; kaj la amiko, kiu posedas kompaton.
el: Digha-Nikajo
54. La jenaj kvar specoj da amikoj konu kiel falsaj: li, kiu prenas ĉion kion li povas; li, kiu parolaĉas; li, kiu parolas sole por komplezi; kaj li, kiu agas tiel, ke perdo rezultiĝas.

el: Digha-Nikajo

55. Se oni agas amikece tenante nenian malbonan penson al iu estaĵo, kaj, se tiel aganta oni taŭgiĝas;

Kaj, se oni havas kompaton en sia menso al ĉiuj vivantaj estaĵoj, ĉi tiu nobla ago ja akiros grandegan virton.

el: Itivuttako

56. Same kiel la suno leviĝas senpartieme sur homoj, altaj kaj malaltaj, Vi, kiu estas la Lumo de la mondo, la Budho, predikas la Veron al la ne-sciuloj.

el: Rjoga-kjo

57. Estas multaj Budhoj en la pasinta mondo, en la nuna mondo kaj en la estonta mondo. Kiel ili atingis Budhecon? Kio estas la Budheco? Se vi volas scii, ekzameni vian propran menson. El ĉio en la universo, menso estas la sola kreanto de la Budheco.

el: Kegon-kjo

58. Antaŭen! Ho, bravuloj, serĉantoj de la Leĝo!

Eĉ kiam ciuj mondoj falos en flamojn kaj ruinojn, vi certe preterpasos naskiĝon kaj morton!

Ŝinran Ŝonin, fondinto de la japana Ĵodo-ŝin-ŝu sekto

59. Sanghanoj, vi devas discipliniĝi!

Dankema vi estu, kaj plene de dankeco.

Ne permesu, ke la plej eta donaco estu donata al ni vane!

el: Itivuttako

60. Kiam la bona laiko amasigas riĉaĵojn, li povas esti profita al sia socio. En kvar porcioj li dividi tiun riĉaĵon. Unu porcion li elspezu por aliuloj, por alies beno; kaj li gustumu la frukton (de la bon-ago). Por lia negoco, li prenu du porciojn, kaj la kvaran porcion li rezervu kaj ŝparu. Tiel restas ankoraŭ io por postaj bezonoj.

el: Digha Nikajo.

61. Kvankam mia korpo jam forpasis, mia instruo eterne vivos same freŝa kiel la herbo apud la Vaka-no.

Ŝinran Ŝonin

62. Kvankam gaj-koloraj la burĝonoj ŝvebas teren, ho ve!

Kiu, do, en tiu ĉi mondo povas eterne vivi? Transmigrante hodiaŭ la finfinan limon de la fenomena ekzistado, mi ne plu vidos fluantajn revojn kaj ne plu ebriiĝos.

63. Estas pro kompato, ne pro gajn-deziro, ke nobla homo prizorgas aliulon en mizero; kaj li faras tion eĉ ĉu la aliulo komprenas tion aŭ ne.

el: Ĵatako

64. Gasteco al tiuj personoj kiuj indas ĝin estas kiel semo, semita en bona grundo; ĝi rikoltos abundan frukton.

el : Mahavaggo

65. Ne atingebla per irado estas la mond-fino. Tamen, ne estas ia liberiĝo el mizero por homo ĝis li atingos la mond-finon. Ja, vere li, kiu estas saĝa kaj kiu vivadas noble, konas la mondon. Li iradas al la mond-fino. Trankviligita estas li ĉar li scias: Mi sopiradas nek por tiu ĉi mondo nek por iu ajn alia mondo.

el: Anguttara-Nikajo

66. Vane estas atendadi ĝis la morgaŭo;
Vivo estas kiel belega ĉeriz-floro, kiu antaŭ-matene eble estas tute for;
blovantaj ventoj povus ĝin rapide forblovi.

Ŝinran Ŝonin

67. Rememoriĝi pri multaj bonaj kaj taŭgaj aferoj ne estas grave, ĉar estas same kiel kalkuli la bovinojn de aliulo. Tio ne estas la vojo de la prava disĉiplo.

el: Anguttara-Nikajo

68. Eĉ malgranda knabino de sep jaroj povas esti instruanto de homoj, kaj patrino de ĉiuj vivantaj estaĵoj. Ke saĝeco ne havas ian rilaton kun sekso, estas unu el la plej mirindaj leĝoj en la Dharmo de la Budhoj.

el: Ŝu-ŝo-gi

69. Li, kiu pro kredo kaj kompreno elradikigas fieron, povas per sia koro vidi Budhon. Sed la hipokritulo kaj pasiulo, kvankam serĉanta por Li tra eterneco, neniam trovos Lin.

el: Kegon-kjo

70. Ho vi avaraj patronoj aŭskultu min bone! Fari laŭdindajn agojn pro fam-deziro — Serĉi la protekton de la Budho por tiu ĉi vivo — Doni almozojn por gajni rekompencan kaj dividendojn — Servi kaj oferi pro vanteco kaj fiero — Tiuj ĉi kvar vojoj neniam repagos al iu ajn!

71. Aranĝigi sakramentan feston pro manĝegemo — Strebi al Sutra³ (pakera) lernado pro egoismo — Indulgi en malsaĝaj paroloj kaj kantoj pro distro — Doni la konsekriĝojn pro vantcco — tiuj kvar vojoj neniam alportos benojn!

72. Preferi amuzajon anstataŭ solecon — Ami plezurojn kaj malami malfacilaĵojn — Parolaĉi anstataŭ sin dediĉi al meditado — Arogante sin teni en la mondo — tiuj kvar vojoj neniam kondukos iun al Liberiĝo!

Jogulo Milarepo

73. Asocii kun noblaj homoj estas same kiel promeni tra densa nebulo: la vestaĵoj malsekiĝos, kaj la portanto de la vestaĵoj ne rimarkas kiam ili malsekiĝas. Same lernas homo noblecon de sia nobla amiko, eĉ sen scii, ke li estas lernanta. Meditado plenumas sian celon, eĉ sen scii pri kio kaj kiam.

Dogen Zenĵi

74. Ne pritraktu malgrandajn malbonaĝojn kiel ne gravaj, kaj ne diru, ke ili ne vundas multe; ĉar eĉ gutoj de akvo povas plenigi grandan ujon.

el: Nehan-kjo

75. Senlima bonvoleco estas la fundamenta principo en la nobla instruo de la Beatulo. Konsekvence, Budhismo estas la scienco de Liberiĝo kaj la etika Doktrino por gvidi la erarantan homaron al la Vojo de la Vero kaj ĉiama mond-paco.

Upasiko Pitt Chin Hui,
direktorino de la Maha Bodhi lernejo en Singaporo

76. Neniam okazis ia sang-elgutado aŭ milito por propagandi Budhismon. Dum la periodo de la budhana evoluo, Budhismo venkis pro ĝia Doktrino de nemilitemo.

Dhamalassi Thera, cejlona monaĥo

77. Kvankam estus milionoj da Budhoj kaj Sanktuloj tiom multaj kiom la sableroj en la rivero Gango; tamen estus pli bone iradi la vojon kaj firme paŝi sur ĝi, anstataŭ preĝi kaj adori tiujn estaĵojn

el: la granda Sukhavati-vjuha-sutro

78. Li, kiu volas gajni meriton longdaŭran, portanta benon, donu almozojn, estu trankvila, kaj kulturu bonan volon. Pro la praktikado de tiuj tri benindaĵoj, estas saĝa homo, sensufera, renaskota en mondo de feliĉo.

el: Itivuttako

³ Sutra : fadeno, prelego; en Pali-lingvo sutta ; en japana lingvo, kjo

79. Homoj en iliaj rilatoj al patro kaj filo, frato kaj fratino, edzo kaj edzino, parencoj loĝantaj kie ajn, ĉiuj devus reciproke montri amon kaj respekton kaj ne malami unu la alian, aŭ esti fanatikaj; sed estu kontentaj kun tio, kion oni posedas. Neniu devus esti ĵaluza pri aliulo; sed laŭ vorto kaj ago esti milda kaj ne kverelema.

el: Daimurjoĵu-kjo

80. Homoj, kiuj povas rigardi la vivon kaj morton per la sama mensa stato, ne havas zorgojn kaj suferon en tiu ĉi mondo. Vivo kaj morto ne povas esti rigardataj kiel samaj de homoj kiuj estas sentemaj pro doloro.

Manŝi Kijozawa, fama japana verkisto budhana

81. Feliĉaj estu ĉiuj estaĵoj,
estu ĉiuj feliĉaj!
ĉu videblaj aŭ ne videblaj,
ĉu en proksimeco aŭ ĉu en malproksimeco!

82. Feliĉaj estu ĉiuj estaĵoj!
Kiel patrino protektas,
per sia propra vivo, la solan infanon,
same kreu senliman bonvolecon
por ĉiuj estaĵoj!

du stancoj el: Metta-sutto

83. Ĉiama mond-paco nur povas esti akirita per senmemeco kaj senlima bonvoleco.

Kong Hiap (Thailando)

84. Ho! Bestoj estas ne-sciaj kaj malkleraj, malsaĝeguloj renaskiĝos inter ili. Blindigitaj kaj sklavigitaj pro malbona Karmo, la malsaĝuloj ne konas la veron de la Dharmo; blindaj al ambaŭ, malvirto kaj virto, ili rapide forkonsumas siajn vivojn

85. Ne-kapablaj distingi inter kio estas malprava aŭ prava, ili kaŭzas kiel maniuloj multe ĉagrenon. Certaj personoj eĉ diras, ke estas bone esti besto; ĉar ĝi nek bedaŭras nek repentas. Ho! Kiel malsaĝa estas tia ĉi penso!

86. Ĉiuj stultaj vivo-detruintoj -renakiĝos kiel bestoj! La malsaĝuloj kiuj ne scias distingi inter kio estas prava aŭ malprava.

87. Kaj homoj kiuj tenas vicajn pensojn -renaskiĝos kiel ordinaraj bestoj. Estas malfacile al mi priskribi ilian Karmon; tamen, memoru miajn vortojn, kaj kulturu viajn mensojn!

88. Ni ĉiuj devus fari sinceran klopodon vivi puran vivon, kaj esti veraj amikoj al la mondo.

Inter-religiaj konfliktoj kaj malamikecoj devus ĉesi kaj forigitaj kiel malnoblaj kaj senprofitaj.

Pijadassi Thero, cejlona monako

89. Pri la regularo por hejmuloj mi nun volas rakonti, kiaj agoj plej bone taŭgas por tiuj aŭskultantoj. Multokupate, neniu povas sin dediĉi al aferoj postulataj de monakoj.

90. Nek mortigu estaĵon nek instigu mortigon, aŭ aprobi, ke aliuloj prenu vivon. Sed forigu perforton de ĉiu, kiu vivas; vastan koron por ĉiu kiu tremas donu!

91. Do, la aŭskultanto ekkomprenu sin deteni aĵojn preni, nek instigi nek aprobi ŝtelon ĉian formon li rifuzu!

92. De malbonkonduito sin detenu kiel saĝulo enfalejon evitas. Se vivi senedzece li ne kapablas, alies virinon li ne prenu!

93. Iranta al la Fratara aŭ templo, li, al aliuloj, false ne parolu; nek incitu mensogojn, nek aprobu. Li sin detenu de mensogo ĉia formo!

94. Li ne ebriaĵon misuzu, la hejmulo elektanta Dharmon; nek aprobu, nek incitu drinkon, por eviti frenezigon !

95. Ĉar vere drinkemuloj malbonagojn faras, kaj al aliuloj instigas la diboĉon; li evitu la malbon-influan, frenezigan trompon, kiu malsaĝulojn ravas!

96. Li nek mortigu nek prenu ion nedonitan, nek mensogojn faru, nek ebriaĵojn drinku. De malbonkonduito li ĉiame sin detenu, nek li manĝu vespere ion superfluan.

97. Kaj per la Dharmo siajn gepatrojn servu, akorde kun la Dharmo tenu sian vivrimedon; la hejmulo, kiu tiele vivas sian vivon, Li al la mondo de la Bel-spiritoj iru!

el: Samjutta-Nikajo

98. Kiel la juna elefantido, imitante la grandegan beston, kiu skuegas la teron kaj manĝas trunketojn de lotusoj, manĝas koton (kaj mortas) ! tiel ankaŭ mortas la malvirtulo, kiu imitas min.

el: Vinaja-Nikajo

99. Studi Budhismon signifas studi sin mem. Studi la memon signifas forgesi sin mem, kiel tian. Forgesi sin mem signifas konformi sin mem harmonie al la Universala Leĝo (Dharmo); alievorte transcendi sin mem.

Ŝobo Genzo de Dogen Zenĵi

100. Ĉar la korpo estas la hejmo de la karmo, pro tio vi havas en vi la potencon fari ĝin ilon de vero kaj ne de malbono.

el: Ĵatako

101. Esti ŝirmita kontraŭ danĝero mi ne petu sed, sentime por fronti ĝin mi ja estu. Nek petu mi por ĉesigi la doloron sed, por venki ĝin mi havu koron. Mi ne serĉu helpantojn en la viv-batalo sed, ĉiam mi estu mia propra forto. Nek en zorg-plena timo por savo mi kresku sed, pacience gajni mian liberiĝon mi esperu.

Permesu, ke mi ne estu malkuraĝa, sentante vian gracon sole en suferado mia anstataŭ la manpremon vian senti dum oftaj eraroj mi devas atenti.

'Aspirado de Bodhisatvo' de Rabindranath Tagore,
fama hinda poeto kaj verkisto

102. La Budho estas en ĉio, eĉ ĝis la fino de la universo.

La Budha korpo estas elmontrata al ĉiuj estaĵoj, kaj ĉiam laŭ la maniero taŭga por la bezonoj de la homo al kiu ĝi aperas.

el: Kegon-kĵo

103. Konfido formas la ĉef-riĉajon de la homo; La Dharmo, bone praktikata, ĝojegon alportos; Vero estas, nepre, la plej dolĉa gusto; Vivo de saĝo, estas dirite, la plej bona estas.

el: Alavaka-Suttanto

104. "Ja! Fratoj, fratinoj serĉu Nenion de la senhelpaj dioj donace kaj himne,

Nek koruptu kun sango, nek manĝigu frukte kaj kuke;

En vi mem liberiĝon serĉu;

Ĉiu sian malliberejon faras!"

el: 'La Lumo de Azio! de Sir Edwin Arnold,
brita teozofa kaj admirinto de Budhismo,
tradukita de Geo. Yoxon

105. Komprenu, ke la kvin malvirtoj de agitado kaj turmento, malbonvolo, maldiligenteco kaj letargio, deziro kaj dubo estas la ŝtelistoj, kiuj ŝtelas la trezoron de la virto!

106. Kredo, energio, atentemo, meditado kaj saĝeco, estas la kvin plej bonaĵoj.
Strebu per tiuj, ĉar ili estas vere la plej altaj potencoj kaj kapabloj!

Nagarjuna, hinda budhana monako kaj fama filozofo

107. Ŝtono estas malmola, akvo estas mola, tamen akvo post tempo povas kurbigi
ŝtonon. Simile spirita vekigo nepre penetrigas niajn korojn se ni daŭre strebas.

Rennjo Ŝonin, Japana budhana patriarko

108. La tagoj pasas; forrapidas la noktoj; la vivŝtupoj malaperas unu post la alia.
Ekkonante la danĝeron de la morto, oni devus eviti la allogaĵojn de la mondo,
kaj vidi nur la Beatan Pacon.

el: Samjutta-Nikajo

109. Ĉiuj estaĵoj estas tio kio ili estas pro la Karmo de siaj agoj faritaj en pasinta kaj
nuna ekzistado.

el: Ŝu-ŝo-gi

110. Neniu pro naskigo estas brahmano; nek brahmano pro naskigo. Pro agoj oni
estas brahmano; pro agoj nebrahmano. Pro agoj oni estas farmisto; kaj pro
agoj oni iĝas artisto.

Pro agoj oni ankaŭ estas komercisto. Pro agoj oni estas aŭ servisto aŭ ŝtelisto.
Pro agoj soldato kaj famulo oni estas.

Kaj, eĉ tiel iĝas reĝo pro agoj. Estas tiel vere, ke saĝulo perceptas agadon
(Karmo).

111. Perceptantoj de la origino de kaŭzo, spertuloj de la rezultoj de faroj ĉiuj same
evoluas de agoj.

La homaro turniĝas pro agoj.

Kiel stifto tenagas la rulantan ĉaran radon, tiel la estaĵoj estas en servuto
tenataj de agoj

Brahmano oni iĝas pro brahman-farado; pro sobreco, disciplino, sindeteno.

Ĉi tiu estas vere superega por brahmaneco.

el: Samjutta-Nikajo

112. Malofte riĉulo ĝuas la akiritajn riĉaĵojn; tio estas la ironio de la Karmo kaj
Samsaro. Mono kaj juveloj gajnitaj pro avareco aŭ ekspluato, estas samaj kiel
la manĝaĵ-sako⁴ de tiu ĉi virino.

Jogulo Milarepo

113. Jen, vidu la homojn strebantaj. Kiel perforte ili bredas timon; li rakontu pri la
konsterno, la teruro sentita de mi.

⁴ nome malbon-odoranta.

114. Kiel fiŝo⁵ en lageto malprofunda
Vidis homojn baraktantaj,
Mi vidis la fendojn inter homoj,
kaj timon envenis min.

115. Pendojn kiel la nura fino
Mi vidis, kaj elleviĝis mia koro.
Tiam, jen! Mi vidis la dornon
trapikante la koron! Malbela vido!

116. De regno al regno kuras li,
kiu de la dorno estas pikita.
Sed li, kiu eltiras tiun dornon
nek kuras nek malalte sintenas.

el: Samjutta Nikajo

117. Malpli estas la akvo de la oceano ol ĉion de la akvo verŝita per larmoj, el la okuloj de homoj kiuj funebras pro doloroj. Kial malŝparu vian vivon meditante pri amara malfeliĉo?

el: Theragatho

118. Tiel rigardu tiun ĉi malkonstantan mondon:
Kiel la fulmbriladon de somera nuboj,
kiel stelon dum la ektagiĝo,
kiel la malkonstantan briladon de flamo,
kiel la rapide pereantan ŝaumon de ondo,
kiel fantomon, imagaĵon, senestecon,
kiel la sonĝon de dormema spirito.

el : Praĵnaparamita sutro

119. Komerco kun armiloj, komerco kun vivantaj estaĵoj, komerco kun viando, komerco kun ebriaĵoj, kaj la komerco kun veneno, kaj la jenaj profesioj ne taŭgas al vera budhano: la profesio de buĉisto, bird-kaptisto, bestkaptisto, ĉasisto, fiŝisto, rabisto, ekzekutisto, malliberej-mastro kaj aliaj kruelaj profesioj aŭ okupoj.

el: Anguttara-Nikajo

120. La Budho diris: Fratoj! Troviĝas ĉi tiuj tri specoj da homoj en la mondo:
la malplenkapulo, la malsaĝulo, homo kiu ne povas kompreni, kvankam li

⁵ El la Ĵatakoj, tio estas, la Renaskiĝrakontoj de la Bodhisatvo, la posta Gotama Budho.

ofte vizitas la Fratojn, li aŭdas ties prelegojn, komence, meze , fine li tamen ne povas kompreni, saĝo ne estas lia.

Pli bona ol li estas homo kun konfuza menso. Tiu, kiu ofte kaj ofte iras al la Fratoj, aŭskultante ties prelegojn, komence, meze fine, kaj sidanta tie povas kompreni la vortojn, sed, leviĝinta, nenio restas; malplena estass lia menso.

Pli bona ol tiuj du estas homo kun vasta scio. Li, kiu ofte kaj ofte vizitas la Fratojn, aŭskultanta ties prelegojn, komence, meze, fine, kaj sidanta tie povas kompreni la vortojn, leviĝinta li tenas ĉion en sia menso, firme, senhezite, lerta en la Dharmo kaj en tio, kio konformas al ĝi; tiu estas la homo kiu atingos la finon de suferado.

el: Anguttara-Nikajo

121. Tage ni frontas aferojn kiujn ni ne povas regi. Sed ni devas esti kontentaj kun nia Karmo se ni deziras esti liberaj. Jen estas la neceso por mem-observado : Mem-observado turnas nian menson al mem-disciplino.

Manŝi Kijozaŭa

122. Se la okuloj ne dormas, songoj ne povas leviĝi; se la menso ne diferenciĝas, ĉiaj variaĵoj estas en tia esenco.

Hsin Hsin Ming (Ĉinujo)

123. La Sangho neniam estu dividata. La sankta Ordeno kresku en Unueco, tiom longe kiom miaj filoj kaj nepoj regos, kaj dum longe kiel la suno kaj la luno brilos!

Reĝo Aŝoka (Hindujo)

124. Ĉiam estu bonkoraj kaj amemaj al infanetoj, en la lernejo aŭ aliloke, kiuj eble ne estas tiel fortaj kiel vi estas. Kelkaj eble estas lamaj, aŭ ne vidas bone, aŭ eĉ balbutas, eble havas alian fizikan difekton. Nepre vi neniam ridu pri tiaj infanoj, aŭ pri tiuj kiuj havas ian malfortecon. Afabla vorto, bezonata helpeto je la trafa momento gojigas ilin.

U Thittila, birmana monako

125. Li, kiu estante riĉa, ne subtenas siajn gepatrojn maljunajn post kiam la juneco estas for, kaj li, kiu la gepatrojn perfortigas, kiu fraton ĉagrenigas per insultoj, la bopatrinon, fratinnon ankaŭ, konu lin kiel aĉulon!

el: Samjutta-Nikajo

126. Himno al la Perfekta Saĝeco

(La Praĵnoparamito)

Omaĝon al Vi, Perfekta Saĝeco,

senlima kaj transcendentata penso!

Ĉiuj Viaj membroj estas senmakulaj,
senerare la homoj kiuj Vin konas

127. Senmakula, senbarila, silenta
kiel la vasta spaco;
kiu reale, vere vidas Vin,
la Tathagaton⁶ vidas.
128. Kiel la lun-lumo ne diferencas
de la luno, same ankaŭ Vi
en kiu abundas noblaj virtoj,
La Instruantino de la mondo.
129. Tiuj, kiuj plenkompate venis al Vi,
Budhan Dharmon heroldantaj,
tiuj venkas facile, ho Graciulino !
Majesto senkompara.
130. Pura en la koro, kiam firme
tiuj alrigardas Vin
ilia sukceso estas certa, -
Ho, fruktodonantino, Vi !
131. Al ĉiuj herooj, kiuj por aliuloj
havas bonvolecon en la koro
Vi estas patrino, kiu nutras,
kiu naskas kaj donas amon.
132. Instruantino de la mondo,
la Budhoj estas Viaj propraj kompatplenaj filoj;
tiel Vi estas, Ho Beata Sinjorino
la plej granda inter la estaĵaro !
133. Ĉiuj senmakulaj perfektecoj
Eterne ĉirkaŭadas Vin,
kiel la steloj ĉirkaŭadas sunon.
Ho, Vi, la Senkulpa Sanktulin' !
134. Ili, kiuj bezonas lumon, pripensi
la Tathagatojn, laŭdegas Vin,

⁶ Tathagato: Li kiu tiel iris aŭ venis (kiel la antaŭaj Budhoj. Budho parolis pri si mem kiel la Tathagato).

la Unuopulinon, kiel multajon,
multformitan, kaj multnomitan.

135. Kiel la roseroj tuŝitaj
de la sunradioj malaperas,
tiel ĉesas pruvoj, teoriaj
se oni iam Vin atingas.
136. Kiam timiga vi aperas -
Vi entingas malsaĝulon.
Kiam beniga Vi aperas -
Vi ensekurigas la saĝulon.
137. Ĉu la homo, kiu nenian amon
havas por vi, kvankam ja Via Sinjoro,
povus li, ho Patrino, ne havi avidon
aŭ malsaton por la vivantaj estaĵoj?
138. De nenie Vi venis
kaj nenien Vi iras;
en nenia loĝloko la saĝulo
iam Vin renkontiĝis.
139. Ne vidanta Vin ĉi simile
ni kvazaŭ jam atingis Vin,
gajnante tiel finan liberiĝon,
ho, kiel mirinda estas tio !
140. Li, kiu vidas Vin ja estas ligita;
Li, kiu ne vidas Vin ankaŭ ligita estas;
Li, kiu vidas Vin estas liberigita;
Li, kiu ne vidas Vin ankaŭ liberigita estas.
141. Mirinda, profunda, famega,
malfacile estas rekoni Vin,
Kiel ŝajnaĵo Vi estas rigardata;
tamen Vi estas neniel vidata.
142. Por ĉiuj Budhoj, unuopaj Budhoj,
por disĉiploj favoritaj ankaŭ
Vi estas la sola Vojo al saviĝo,
ne ekzistas alia, vere.

143. Savantoj de la mondo
ke homoj ekkomprenu,
parolas pri vi, observantaj kutimojn
tamen, pri Vi ili ne parolas.

144. Kiu kapablas ĉi tie laŭdi Vin
mankante signoj, karakterizaĵoj?
Vin, kiu transcendas la limon de parolo,
ne subtenata ie ajn !

145. Per tiaj vortoj de kutima lingvo
ni konstante laŭdas Vin, al kiu
nenia aklamado nia tuŝas;
tiel, beatecon ni atingas.

146. Pro mia laŭdo al la Perfekta Saĝeco
meriton mi eble kulturos.
La mond-homaro sin dediĉu
al tiu ĉi Saĝeco al kiu nenio komparas.

Rahulabhadra, hinda budhana monako

147. Feliĉo ni vivu, ĝojigita pro Ne-perforto. Al tiuj inter vi kiuj vivas ĝojigita pro
ne-perforto, ĉi tiu ideo estas grava: tio estas, pri tia vivmaniero ni kaŭzas
nenian vundon al iu ajn vivanta estaĵo.

el: Itivuttako

148. Li, kiu taŭge agas kaj laboras,
ankaŭ klopodas, riĉaĵojn trovas;
famon li trovas pro la vero,
amikojn ankaŭ pro donemo.

149. Kaj hejmuloj, kiuj atendadas
fidele la ĉi tiujn kvar:
Veron, Dharmon, Firmecon, Donemecon,
ne plu malĝojos kiam ili mortas.

150. Kun brahmano kaj asketo
profunde ĉi tion esploru:
Ĉu ekzistas io pli alta ol vero,
deteno, pacienco kaj donemo?

el: Samjutta-Nikajo

151. Neniu luno estas en la akvo malgraŭ, ke ni vidas la lunon sur la glata surfaco de la akvo. Multaĵoj estas iluziaj, same kiel la reflektado de la luno. Malsaĝulo imagas, ke la Memo estas reala kaj vera.

el: Ŝinĵi-kvan-kjo

152. Estas pro egoismo, ke homoj suferas. Ne-konstantaj estas posedaĵoj en tiu ĉi mondo ĉar ĉio estas destinita al ŝanĝo: pro tio, neniu tenegu al la Memo!

el: Samjutta-Nikajo

153. Disciplinita homo estas libera ; estante libera, li ĝojas; li estas trankvila kaj feliĉa.

el: Ĉu-Agon-kjo

154. Mi, Budho, kies kor' krevita estis, kiu ploris pro la plorad' de ĉiu, ĝojegas, ridas, ĉar la libereco ekzistas! Suferantoj, ho vi sciu, Vi, pro vi mem suferas!

el: 'La Lumo de Azio' tradukita de Geo. Yoxon

155. Ĉiam denove ni semas semaĵojn;

Ĉiam denove la nuboj pluvigas;

Ĉiam denove kamparanoj plugas kamparon;

Ĉiam denove almozpetas almozuloj;

Ĉiam denove la sinjoroj donas donacojn;

Ĉiam denove oni iras al pli feliĉaj mondoj;

Ĉiam denove bovinoj donas lakton;

Ĉiam denove la bovido iras al sia patrino.

Ĉiam denove oni laciĝas kaj tremas;

Ĉiam denove serĉas la ellaciĝinto sian ĉambron;

Ĉiam denove oni naskiĝas kaj mortas;

Ĉiam denove oni portas kadavrojn al la tombejo; sed li, kiu trovas la vojon al la Neniam-renaskiĝo, tiu saĝulo certe neniam plu renaskiĝos.

el: Brahmano-Samjutto

156. Evidenta estas la bono en la vivo,
evidenta ankaŭ la suferado estas;
Li prosperas, kiu Dharmon amas,
suferas li, kiu malamas Dharmon.

157. Li, kiu asociiĝas kun malbonuloj,
kaj ne kun bonuloj amakiĝas,
sed elektas la vojon de malnobluloj:
fonto de suferado li ja estas!

158. Se homo kunularon avidas, kaj multe dormas,
kaj kiam estas li sendisciplina,
malvigla kaj konata pro kolero:
fonto de suferado li ja estas!
159. Kiu, estante riĉa ne subtenas
siajn gepatrojn dum maljuneco,
kiam ilia juneco tute forestas:
fonto de suferado li ja estas!
160. Li, kiu per falsaj vortoj
ofendas brahmanon kaj asketon,
aŭ alian almozulon:
fonto de suferado li ja estas!
161. Se riĉa laŭ proprajoj kaj rimedoj,
laŭ oro kaj arĝento homo ĝuas ĉion sole:
fonto de suferado li ja estas!
162. Se viro virinon dorlotas,
pri drinkaĵoj kaj ludoj simile
kaj ĉiujn ŝparaĵojn malŝparas:
fonto de suferado li ja estas!
163. Se iu, malkontenta pri edzino
iras kun edzinoj de aliuloj;
aŭ kun fi-virinoj:
fonto de suferado li ja estas!
164. Se viro jam maljuna ediziĝas
kun knabino de rondaj manoj,
li, pro ĵaluzo ne endormiĝas:
fonto de suferado li ja estas!
165. Se viro aŭ virino,
malŝparulo aŭ drinkulo
estas en reĝ-posteno:
fonto de suferado ili estas!
166. Kiam de nobla klano naskita,
homo malriĉe sentas kaj avidas
por multe, kaj sopiras regi:
fonto de suferado li ja estas!

167. Ĉi tiujn suferojn en la mondo
saĝuloj komprenas, kaj benitaj
kun vizio prava, nobla,
serĉas ili la Mondon de Feliĉo.

el: Samjutta-Nikajo

168. Gardu la senton de vido; kontrolu la senton de vido, kaj ankaŭ faru same kun
la aliaj sent-organoj, -kaj kiam mense konscia vi estas pri io, ne estu influata
pro ĝia ĝenerala aspekto, aŭ pro ĝiaj detaloj.

el: Maĵhima-Nikajo

169. Ne plu faranta kalumnian parolon, li (la disĉiplo) sin detenas de kalumnia
babilo; tion kion li aŭdas en unu loko li ne rakontas en alia loko por kaŭzi
disiĝon. Li estas eĉ flegante por helpi unuiĝon, ĝojiganta en konkordo,
entuziasma pro konkordo, kaj parolanto de vortoj kiuj kaŭzas konkordon.

el: Digha-Nikajo

170. La vivo de la homo estas forfluganta; mallonga estas la tempo de niaj tagoj!
Tiuj, kiuj atingas maljuniĝon ne havas defendon; tial tenu antaŭ viaj okuloj la
horon de la morto, kaj faru bonajn agojn, kiuj kondukos al feliĉo.

el: Anguttara-Nikajo

171. Malkapabla plenumi Dharmon dum vivo pravas ne-scion pri ĝi kiel nenia
alia povas.
Inteligenta kompreno kaj praktiko de la Dharmo en la menso kaj vivo, ĝia
taga ekspansigo de kompreno pro meditado, estas bezonata se oni volas, ke ĝi
daŭru.

172. Se neniu en la nuna tempo atestas por la Dharmo, kiel povus ne-budhano
prijuĝi ĝin ?

La presita Dharmo estas nur gvidilo, ne celo en si mem, sed rimedo montri la
Vojon kiel atingi la celon.

La parkera lernado de la Dharmo sole ne portas fruktojn. Ĝia frukto venas
sole el la vivo kaj praktiko.

Sen, cejlona budhano

173. Inter ĉiuj donacoj, la Dharmo la plej valora estas;
Inter ĉiuj aromoj, la Dharmo estas la plej unua;
Dharma-feliĉo, superas ĉiujn aliajn feliĉojn
La Dharmo forigas suferon kaj estingas soifon.

Kaŝapo (Hindujo)

174. Ŝango aŭ ne-konstanteco estas la esenca karakterizaĵo de la fenomenaj ekzistado. Ni ne povas diri pri io ajn, inspira aŭ seninspira: "Ĉi tiu estas konstanta", ĉar eĉ dum ni estas diranta tion, ĝi estas ŝanĝinta.
Ĉio estas ne-konstanta: la beleco de floro, la melodio de birdo, la gloro de la sun-subiro.

175. Al budhano la unua konsideraĵo de la vivo ne estas nur revado aŭ vanaj vojaĝoj en imagajn regionojn de alta fantazio; sed la gajno de vera feliĉo kaj liberiĝo de ĉia suferado. Al li la vera scio dependas de la centra demando: "Ĉu ĉi tiu instruo estas laŭ la vero? Ĉu estas io, kio povas esti utila al mi por la atingo de reala kaj eterna feliĉo?"

176. Vivo estas nur lampo, kiu brulas tiom longe kiom ĝi estas nutrata de la oleo de avido.

Kaj, kiel bovoj vagas serĉantaj freŝajn paŝtejojn, estaĵoj allogataj de avido, iras de naskiĝo al naskiĝo, ĉiam serĉantaj por nutraĵoj per kiuj la viv-flamo povas esti nutrata. Ju pli longe homo ne elfosas deziron des pli longe li estas mense katenita, kiel suĉ-bovido al ĝia patrino. Tamen ne estas persona identeco, Memo aŭ animo en tiu, kiu pasas en la sekvontan naskiĝon.

Pijadassi Thero, cejlona monako

177. Longa estas la nokto por li kiu ne povas endormiĝi; longa estas mejlo por la ellacigita migranto; longa estas la rondo de naskiĝoj kaj mortoj por la malsaĝulo kiu ne konas la pravan Dharmon.

178. Se oni renkontiĝas kun saĝulo, kiu same kiel eltrovanto de trezoro, elmontras niajn erarojn kaj nin admonas; asociiĝu kun tia saĝa homo; ĉar estas je la plej bono kaj ne je la malbono, se oni asociiĝas kun li.

179. Solida roko estas ne skuebla pro la vento; same la saĝulo restas sen-mova pro laŭdo aŭ mallaŭdo.

tri stancoj el: Dhammapado

180. Buddham, saranam gaĉĉhami.

(Budhon, rifuĝon mi iras)

Longa procesio iras

tra la tempoj supren al Vi,

kun burĝonoj ros-kovritaj

kaj kun incenso senfine.

Tien iras sankt-mireme al la ĝardeno de la naskiĝo

(en kiu enlumiĝis Vi)

la nacioj de la tero.

Kaj la lertaj kun la simplaj,

liberaj, junaj kaj maljunaj,
kune murmurante migras:
"Sinjoron, rifuĝon mi iras."

181. Kun hezitaj, tedaj paŝoj
al Vi, tra perditaj jaroj,
kun burĝonoj velkiĝantaj
dubeme proksimiĝas mi.
Eraroj, duboj, suferoj
mian pezan koron vundas,
sed nun flugas la esperoj
kiel kolomboj supren al Vi.
Kun ĉiuj miaj malperfektoj,
tage malpli heziteme,
vokante proksimiĝas mi:
"Sinjoron, rifuĝon mi iras."

Anagarika Dharmapala,
fondinto de la Maha Bodhi Societo de Cejlono kaj Hindujo.

182. Oni devus scii, ke ĉiuj videblaj fenomenoj estas iluziaj kaj ne-realaj.
183. Oni devus scii, ke la menso, ne estante sendependa ekzistaĵo, estas nekonstanta.
184. Oni devus scii, ke ĉiuj ideoj leviĝas el kunĉeniĝo de kaŭzoj.
185. Oni devus scii, ke la korpo kaj la menso, estante kombinitaj el la kvar elementoj, estas efemeraj.
186. Oni devus scii, ke ĉiuj rezultoj de pasintaj agoj ne estas eviteblaj kiam ili maturiĝas.
187. Oni devus scii, ke suferado, estante rimedo por konvinki nin pri la neceso de religia vivado estas Guru' (spirita gvidanto).
188. Oni devus scii, ke aliĝo al mond-aferoj faras materian prosperon kontraŭa al spirita progreso.
189. Oni devus scii, ke malfeliĉo, estante la rimedo por gvidi al la Dharmo, ankaŭ estas Guru'.
190. Oni devus scii, ke nenia estaĵo havas sendependan ekziston.

191. Oni devus scii, ke ĉiuj estaĵoj estas interdependaj.
"La dek aferoj, kiujn oni devus scii",
el: "La Preceptoj de la Guruoj" (Tibeto)
192. La tuta universo estas Budho, kaj ĉi tiu estas la vera naturo de la Budho.
Saiĵe Okĵo (Japanujo)⁷
193. Iru, kaj serĉu kien ajn kaj vi eltrovos, ke la floro de la Budha-Dharmo estas la
sole vera floro!
Ŝunzei (Japanujo)
194. Li, kiu pure vivas, trankvilon donas, kaj potencon gajnas.
For estas la timo, kie virto regas en nobla koro.
Kaŝapo (Hindujo)
195. Niajn malpurajn korpojn ni ornamas kaj adoras. Sed ĉi tiuj ĉarmaj, adoritaj
objektoj ne plu prezentas allogan vidon kiam defektitaj post longa tempo aŭ
malsano.
196. Ni deziras vivi pace, kune kun niaj plej amatuloj ĉirkaŭataj de plezuro kaj
amuzoj; sed kiam, pro maloportuno, la malvirta mondo malsukcesigas niajn
ambiciojn kaj dezirojn, la neevitabla sufero ne estas priskribebla.
W. F. Ratnapala (cejlona budhano)
197. Malsaĝuloj pensas, ke suferado sole estas en la sento de doloro. Vere iliaj
sentoj estas distorditaj. Ili estas same kiel malsanulo, kiu imagas, ke sukero
estas maldolĉa. Lanugo sur la mano ne estas sentebla, tamen, en la okulo ĝi
kaŭzas severan doloron. La manplato estas la malsaĝulo; la okulo estas la
saĝulo. Nur saĝulo profunde komprenas la suferadon de la mondo.
el: Madhjamakavritti
198. Alkutimiĝinte dumlonge al kontemplado, amo kaj kompatado, mi forgesis ĉian
malsimilecon inter mi kaj aliuloj.
199. Alkutimiĝinte dumlonge al meditado laŭ la Flustritaj Elektaj Veroj, mi forgesis
ĉion, kio estas dirita kaj skribita en presitaj libroj.
200. Alkutimiĝinte, kiel mi estas, mediti pri ĉi tiu vivo kaj la estonta vivo kiel unu;
mi forgesis ĉian timon pri naskiĝo kaj morto.

⁷ Tre probable mistajpita origine; mi (Yamaguti) ne scias, kiu li estas.

201. Alkutimiĝinte dumlonge studi solece miajn proprajn spertojn; mi forgesis la bezonon serĉi la opiniojn de amikoj kaj fratoj.

202. Alkutimiĝinte dumlonge atentigi al ĉiu nova sperto de mia evoluanta spirito, mi forgesis ĉiujn kredojn kaj dogmojn.

203. Alkutimiĝinte dumlonge mediti pri la Ne-naskita, Ne-detruenda kaj Ne-estanta, mi forgesis ĉiujn distingojn pri ĉi tiu aŭ tiu certa celo.

204. Alkutimiĝinte dumlonge scii la signifon de la Senvorta, mi forgesis la manieron esplori la radikojn de verboj kaj la originon de vortoj kaj frazoj.

Jogulo Milarepo

La Kvar Noblaj Statoj (Brahma-Vihara)

1-a Amo (Metta)

205. (mankas)⁸

206. Amo, kiu ne volas posedi ĉar ĝi scias, ke laŭ la vero nek ekzistas posedaĵo nek posedanto, tiu estas la plej granda amo. Amo, kiu ne diras "Mi" ĉar ĝi scias, ke la "Mi" nur estas iluzio.

Amo, kiu nek estas partia nek elektema, bone scianta, ke ĝi pro tio nur nutrus sian kontraŭon: malbonvolecon, malŝaton, abomenon kaj malamon.

Amo, kiu inkludas ĉiujn vivantajn estaĵojn: malgrandajn kaj grandajn, malproksimajn kaj proksimajn, la enloĝantojn de la tero, de la akvo kaj de la aero.

Amo, kiu inkludas ĉiujn estaĵojn, la noblajn kaj la malnoblajn, la bonajn kaj la ne-bonajn; ĝi inkludas la noblulojn kaj bonulojn ĉar al ili la Amo fluas sendevige. La malnoblulojn kaj malbonulojn ĝi inkludas ĉar ili bezonas la Amon plej multe. En multaj inter ili eble la ĝermo de la bono ne maturiĝis, ĉar mankis varmecon en senama ĉirkaŭaĵo, kaj pro tio ĝi frostiĝis.

Amo, kiu inkludas ĉiujn estaĵojn, bone sciante, ke ni ĉiuj estas kamaradoj dum la migrado tra la mondo, kamaradoj en nia suferado. Komuna suferado estas forta ligilo inter la estaĵoj.

Amo, – sed ne tiu avidema, brulanta flamo de la menso, kiu kaŭzas pli da vundoj ol ĝi kuracas; kiu nun ekbrulas por estingiĝi post momento kaj postlasas eĉ pli severan malvarmecon.

Sed tiu Amo, kiu same kiel milda, tamen forta mano, ripozas sur ĉiuj suferantaj estaĵoj, ĉiam sin mem egala, senŝancelema, senhezita; estas refreŝiga al tiuj kiuj en la flamo de la suferado kaj pasio brulas. Ĝi estas vivdonanta varmecon al tiu, kiu estas tuŝita de la malvarmecon de soleco, kiu tremas en la frostado de senama mondo, kaj kies koro malpleniĝas pro helpkrio kaj senespero.

Amo, kiu estas scianta, komprenanta, helpanta bonvoleco, Amo, kiu estas forta kaj forton donas, tiu estas la plej alta Amo.

"Liberigo de la koro" nomis la Beatulo la Amon.

"Plej beata beleco" nomis La Beatulo la Amon.

Kaj kio estas la plej alta amo de la Amo? montri al la estaĵoj per ago kaj parolo, la Vojon de Liberigo el la suferado; kiel ĝi estas montrita, irita kaj plenumita de Li, La Beatulo, Gotama Budho.

⁸ tre probable la aŭtoro erare metis la nombron 206 post la antaŭa stanco 204 (Yamaguti)

2-a Kompato (Karuna)

207. La mondo suferas, sed la plej multaj homoj fermas la okulojn kaj orelojn. Ili ne volas vidi la riveregon da larmoj, kiu konstante fluas tra la mondo; ili ne volas aŭdi la kriegon de la suferado, kiu konstante sonas tra la mondo. Iliaj propraj malgrandaj zorgoj kaj ĝojoj baras la vidon, kaj surdigas iliajn orelojn.

En la malliberejo de ilia malgranda "Mi" frostiĝis iliaj koroj, kaj mallarĝiĝis tiaj frostigitaj koroj.

Kiel la koro kapablas strebi al alteco kaj kompreno, ke sole la liberiĝo el la egoisma mallarĝeco ebligas la liberiĝon el la suferado?

Ekzistas kompato, tiu granda forprenanto de la barilo, kiu kapablas malfermi la pordegon al la liberiĝo, larĝigi la malgrandan koron por ĉirkaŭpremi la rondon, - kaj forpreni de ĝi la premantan, paralizantan pezecon - doni al la ter' kaj Mi- klinantoj flugilojn.

Pro kompato la sufero ĉiam estas ĉeestanta, ankaŭ se ĝi ne venas al ni; ĝi donas riĉan sperton pri suferado laŭ siaj multdiversaj formoj, hardigas kaj instruas nin kiel renkonti la suferadon se ĝi trafos nin mem. Kompato amikiĝas kun nia propra sorto, tiel, ke ĝi montras al ni la ankoraŭ-pli-grandan suferadon de aliaj estaĵoj.

Tiu ĉi longa vico de suferantaj estaĵoj - bestoj kaj homoj -, ĉiuj vi iam estis en la senkomenca ĉeno de renaskiĝoj; tiel sciante, malfermu vian koron por kompato. Kio vi antaŭe estis vi povus reesti; se vi estas senkompatema, vi petegos je kompato, se mankas al vi kompreno por la suferado de aliaj estaĵoj, tiam vi ofte - dolorige - havigos ĝin pro propra sperto. Tiel estas la volo de la leĝo de Rezulto; tion sciante gardu vin mem!

Katenitaj en ne-scio estas la estaĵoj, katenitaj en iluzio ili amasigas suferojn nesciante la kaŭzon, sen trovi elirvojon. Tio, sed ne la individua sento de suferado de la estaĵoj, estas la plej profunda kaŭzo por nia kompato. Tial nia kompato estu direktata al tiuj, kiuj, kvankam vivantaj en feliĉo, faras malbonagojn kaj malsaĝagojn; ĉar ni ekkonas per ilia nuna farado la estontan suferadon. Sed la kompato de la scianto ne plu "kunsuferas". Lia menso, lia parolo kaj lia ago estas plenaj de kompato. Sed lia koro ne plu tremas pro tio, ĝi restas trankvila kaj firma.

Kiel li alie povus helpi? Al ni fariĝu tia kompato! Kompato, kiu estas scianta, komprenanta kaj helpanta bonvoleco: Kompato, kiu estas forto kaj forton donas, tiu estas la plej alta kompato.

3-a Kunĝojo (Mudita)

208. Ne nur en kunsuferado, sed ankaŭ en kunĝojo malfermu vin al la estaĵoj: "Ŝpareme mezurita estas feliĉo kaj ĝojo en la mondo, "suferado superas." diris la Beatulo. Se do, tia malmulte da feliĉo kaj ĝojo venas al la estaĵoj, ĝoju kun ili ĉar lumradio eklumigis la nokton de ilia suferado kaj disŝiris la nebulojn de ilia griza ĉiutaga vivado.

Via vivo ja gajnas ĝojon se vi ĝojas pro la ĝojo de aliaj estaĵoj. Ĉu vi ne vidis kiel en momento de ĝojo heliĝis la vizaĝo de homo? Ĉu tio ne estis bela kaj feliĉiga, precipe kiam vi estis la kaŭzo de lia ĝojo?

Ĉu vi ankoraŭ ne spertis, kiel ĝojo, instigis homon al bonaj decidoj kaj agoj, kiuj superis la ordinaran limon? Ĉu tio ne estas eĉ pli bela kaj feliĉiga?

Estas ĉe ni, ĉu vole aŭ nevole, pli ofte sperti tiun ĉi belon kaj feliĉon de kunĝojo, ĉar ni mem kreas ĝojon, mem donas ĝojon al la estaĵoj. Nek trezoroj nek riĉaĵoj estas bezonataj, sed amanta koro, kiu vere vidas sian najbaron (kaj ne sole ties ombron) kaj komprenas la kunĝojon. Ni instruu ankaŭ la homojn kiel feliĉigi!

Kiom multaj inter ni jam mallernis kaj forgesis tion!

Kvankam la vivo estas suferiga, ĝi tamen enhavas la eblecon por ĝojo kaj felico, kiujn multaj ne konas.

Ni instruu al la homoj serĉi por ĉi tiu forgesita fonto de ĝojo kaj feliĉo en ili mem kaj kiel kunĝoji kun aliuloj!

Ni instruu al ili ĉiam denove trovi pli altajn kaj pli noblajn ĝojojn!

Alta kaj nobla ĝojo ne estas fremda al la Doktrino de la Budho. Malprave oni pritraktas ĝin kiel Doktrino de malĝojo. Kontraŭe, ĝi kondukas paŝon post paŝo al ĉiam pli pura kaj beata feliĉo.

Subtila, nobla ĝojo estas helpo sur la vojo de la suferliberiĝo; ĉar sole la spirito de plen-ĝojanto - sed ne tiu kiu estas suferdetruita - kapablas trovi la feliĉan trankvilecon, kiu kondukas al koncentriĝo. Kaj sole trankvila, memkonscia spirito kapablas trapenetri al la liberigata saĝeco.

Ju pli alta kaj nobla la ĝojo de la aliuloj estas, des pli granda kaj valora estas nia kunĝojo. Bona kaŭzo por kunĝojo estas la bona konduto de la najbaro, kiu certigas al li bonan frukton en ĉi tiu kaj sekvonta estado. Fortigu lin en tio! Eĉ pli bona kaŭzo por kunĝojo estas lia fido en la Budha-Dharmo, lia kompreno pri la Doktrino. Ni helpu lin en tio, kaj ni mem kapabliĝu, ke ni povos helpi lin pli kaj pli!

Kunĝojo, kiu estas scianta, komprenanta, helpanta bonvoleco, kiu estas forta kaj forton donas, tiu estas la plej alta kunĝojo.

Kaj, kio estas la plej granda ago de la kunĝojo?

Montri al la estaĵoj per ago kaj vorto la vojon al la suferliberiĝo, kiel ĝi estis montrita, irita kaj plenumita de Li, la Beatulo, Gotama Budho.

4-a Egalanimeco (Upekha)

209. Egalanimeco estas la perfekta, senskuebla ekvilibro de la menso radikita en la Enlumiĝo.

Se ni nur ĉirkaŭrigardas en la mondo kaj en nin mem, en nian koron, tiam ni vidas kiel malfacila estas akiri tian ekvilibron de la menso. Ni vidas la seninterrompan tien-kaj-reen de la vivo, ankaŭ de nia propra vivo. Ni vidas la supreniradon kaj falon, sukceson kaj malsukceson, ni spertas honoron kaj malhonoron, laŭdon kaj insulton, kaj ni sentas kiel nia koro respondas per feliĉo kaj doloro, timo kaj espero. Tiuj potencaj ondoj de la menso tiras nin alten, puŝas nin malsupren, kaj kien ni, dum mallonga paŭzo, en trankvilo retrovis nian spiron, tiam venas nova ondo kaj ludas kun ni. Kiel ni povus havi pozicion sur pinto de ondo? Kiel ni povus konstrui konstruaĵojn en la riverego de ĉi tiu mondo, se ne sur la rok-insulo de la Egalanimeco ?

Mondo, en kiu la malmulto de feliĉo kiu estas dediĉita al la estaĵoj, plej ofte nur estas akirebla post multaj seniluziaj kaj malvenkoj.

Mondo, en kiu la kuraĝo por denove komenci promesas sukceson - en kiu kreskas ŝpareme ĝojon nur inter malsano, disiĝo kaj morto, -en kiu, estaĵoj kun kiuj ni ĵus estis en Kunĝojo ligitaj post momento jam bezonas nian kompaton, - tia mondo bezonas egalanimecon , sed, devas esti tiu Egalanimeco, kiu estas vekiginta forto kaj ne stulta senintereso. Li, kiu en konscia flegado fortiĝis ne estas dependa de hazarda mensstato.

Egalanimeco, kiu ne nur post pena klopodo, ĉiam denove devas esti kreita, kaj pro tio sin mem eluzas kaj fine pereas, sed Egalanimeco, kiu posedas la kapablon memrenoviĝi. Tamen, nur Egalanimeco, kiu radikigiĝas en la Kompreno havas tian forton!

el: Brahma-Vihara; komentita de Njanaponiko Mahathero,
Fondinto-eldonanto: Buddhist Publication Society, Kandy Cejlono

210. Li, kiu havas okulojn por percepti la malhelpaĵojn sur la Vojo devus antaŭenpaŝi firme; same en la hejma-vivo ĉiam sian virton malan forigu la sagulo!

el: Udano

211. Menso estas la origino de ĉiuj malbonaj statoj. La menso estas ilia ĉefulo. Se oni parolas aŭ agas kun malvirta menso, suferado sekvos nin, same kiel la radoj sekvas la kufojn de ĉar-tiranta bovo.

212. Menso estas la origino de ĉiuj bonaj statoj. Menso estas ilia ĉefulo. Se oni parolas aŭ agas kun pura menso, feliĉo sekvos nin, same kiel ombro kiu neniam forlasas nin.

213. Li insultis min, li batis min, li venkis min, li rabis de mi. En homoj kiuj tiel pensas, la malamo neniam ĉesos.

214. Li insultis min, li batis min, li venkis min, li rabis de mi. En homoj kiuj ne tiel pensas, la malamo ĉesos.

215. Malamo neniam ĉesas pro malamo en tiu ĉi mondo; sed sole pro amema bonvoleco la malamo ĉesos. Tio estas antikva leĝo.

216. La kverelemuloj ne scias, ke oni povas perei en tiaj kvereloj; sed tiuj inter ili kiuj tion ekkomprenas, pacigas la kverelojn.

ses stancoj el: Dhammapado

217. La potenca oceano, la nemezurebla profunda maro, senlima hejmo de multege da perloj - kiel riveroj, servantaj al sennombra amaso da homoj, fluas rapide antaŭen en la grandegan oceanon, ĝuste tiel, al kiu donas nutraĵojn, trinkaĵojn, vestaĵojn, kiu liton kaj seĝon kaj kovrilon provizas, torentoj de merito fluas al tiu saĝulo, kiel riveroj portantaj akvon atingas la oceanon.

el: Samjutta-Nikajo

218. Laikulo, kiu en la nomo de la Budha-Dharmo strebas al materia profito sole, kaj ne strebas plenumi la almenaŭ la kvin preceptojn, estas pro sia malbonago kondamnita al doloriga malsukceso en tiu ĉi vivo aŭ en la sekvonta. Se li rikoltos en la sekvonta vivo la frukton de sia pasinta malbona Karmo, li certe renaskiĝos inter la ĉiam malsataj spiritoj.

Lama' Dorĵo Gjaltzen

219. Monako, kiu pro mon-avidemo subtenas la tradiciajn superstiĉojn de siaj sekvantoj, aranĝas multekostajn ceremoniojn, ritojn - en kiuj lia koro kaj menso tamen ne partoprenas, - renaskiĝos kiel malbon' odoranta, subhoma estaĵo.

Bhikŝu Anuruddha (Vjetnamio)

220. Li, kiu akiris bonan kamaradecon, povas pro tiu asocio, gajni scion, liberecon kaj memkontrolon.

el: Khuddaka-patho

221. Pensu kaj planu kun atentemo; forigu ĉion malbonon. Elektu tion, kio estas bona kaj strebu fari bonon.

el: Anguttara-Nikajo

222. Vere, ho Fratoj, ekzistas stato, kie nek estas tero nek akvo, nek fajro nek aero, nek spac-limo nek limigo de la konscio, nek estas ĉi tiu mondo nek alia mondo, nek suno nek luno. Tio, ho Fratoj, mi nomas: nek veni nek iri, nek stari, nek naskiĝi nek morti. Estas sen tempo, sen evoluo, sen fundamento; tio estas la fino de la suferado.

Malfacile estas kompreni la esencon; la Vero ne estas facile rekonebla, sed la sciinto jam estingis avidon, kaj al la vidanto ĉiuj aĵoj estas ne-realaj.

223. Ekzistas, ho Fratoj, ia nenaskita, neevoluita, nekreita, nekonstruita, nekomponita. Se ne ekzistus, ho Fratoj, la nenaskita, neevoluita, nekreita, nekonstruita, nekomponita, tiam, ne eblus liberiĝon el tiu ĉi mondo de la naskita, evoluita, kreita, konstruita, komponita. Sed ĉar, ho Fratoj, ekzistas tio nenaskita, neevoluita..., tial ankaŭ eblas liberiĝon el la mondo de la naskita, evoluita, kreita, konstruita kaj komponita.

el: Udano

224. Ĉiuj materiaj formoj, sentoj, perceptoj, konstruoj kaj ĉiuj konscioj, ĉu pasintaj, estontaj aŭ nuntempaj, subjektivaj aŭ objektivaj, maldelikataj aŭ delikataj, malnoblaj aŭ noblaj, proksimaj aŭ malproksimaj devus esti perceptataj kiel: "Ĉi tiu ne estas mia, mi ne estas ĉi tiu; ne estas mi mem."

el: Majjhima-Nikajo

225. Ekzistas ĉi tiuj du specoj de donacoj, ho fratoj, nome: la donaco materiala kaj la donaco de la Dharmo. El tiuj du donacoj, la donaco de la Dharmo estas la plej valora.

Ekzistas ĉi tiuj du elspezoj: tiu de materialoj kaj tiu de la Dharmo. El tiuj du la elspezo de la Dharmo estas la plej valora.

Ekzistas ĉi tiuj du specoj da favoraĵoj, nome: tiuj de materialaj kaj la favoraĵo de la Dharmo. El tiuj du la favoraĵo de la Dharmo estas la plej valora.

Ekzistas ĉi tiuj du specoj de oferaĵoj, nome: tiu de materiaĵoj kaj la oferaĵo de la Dharmo. El tiuj du la oferaĵo de la Dharmo estas la plej valora.

el: Itivuttako

226. Al la Budho

Al Vi, Ho Sinjoro mi venas
portanta oferaĵon humilan,
lumantan bukedon de floroj, jasmin' kaj lotuson ruĝan,
'Na' kaj 'Sapu' de plej palaj nuancoj;
ilia beleco ĉe Viaj piedoj mi metas.

227. Ho ve! ĉinokte la floroj velkiĝos.

Ilia beleco kaj aromo baldaŭ mortos,
same ankaŭ ĉi tiu putra memo mia.
Sed permesu, ke mi restu iom pli longe
sub Via trankviliganta ombro
por rigardi al Vi senpasie-mute-sole.

228. Kio, Ho Plej Noblulo, estas Via sekreto,
 kio kaŭzas, ke fierulo, riĉulo
 iĝas antaŭ Viaj piedoj humila?
 Kia estas de la menso-paco tia
 Kiun vi, sole Vi, povas doni -
 Ĉu pro Via senmemeca amo al la tuta homaro?
 Ne - mi ne povas klarigi!
- Malika Perera,
 cejlona budhanino
229. Li, kiu estas memkontrolita laŭ manoj, piedoj, en vortoj kaj mens-statoj; Li,
 kiu ŝatas meditadi kaj trankvila estas; Li, kiu vivas solece kaj kontenta estas -
 lin oni nomas (veran) bhiksu' (budhana monako).
- el: Dhammapado
230. Estas trovebla neniu Dio nek Brahmo, Neniu konstruanto de la rado do vivo.
 Malplenaj fenomenoj estas ĉi tie - dependantaj de kondiĉoj ĉiuj nur estas.
- Buddhaghosa,
 fama cejlona budhana monako,
 verkisto kaj komentanto.
231. Estas saĝeco, kiu pruvas la raportojn de agoj kaj decidas pri la progreso de la
 famo de homoj.
 Li, kiu havas saĝecon eĉ povas trovi feliĉon en malfeliĉo.
- el: Ĵatoko
232. Mi proklamas la forigon de la egoismo, avido, malamo kaj iluzio. Sed mi ne
 proklamas la forigon de la bonvoleco, amo, donemo kaj vero.
- el: Mahavaggo
233. La Dharmo elmontras praktikan Vojon de vivo - ne serion de senmovaj
 kredoj.
- Sen (Cejlono)
234. Tiu libereco (pri la scio de la detruo de sufero) bazita sur la Vero estas
 neskuebla.
 Tio estas malvera, kio estas laŭ sia naturo falsa.
 Tio estas vero, kio laŭ sia naturo ne estas falsa; nome, la Nirvano. Ĉi tiu, ho
 Fratoj, estas la plej alta vero de la nobluloj.
- el: Maĵjhima-Nikajo
235. Ni migradas ĉien por trovi trankvilecon kaj kvietecon; sed ambaŭ estas
 troveblaj nun kaj ĉi tie. Homoj kiuj ne povas esti trankvilaj hejme, ne povas

trovi trankvilecon ie ajn; same kiel ekzemple, tiuj kiuj ne povas esti silentema, ne povas esti elokventaj, aŭ same kiel ili kiuj ne povas obei neniam kapablas ordoni aliulojn. Vere saĝaj homoj povas dum meditado rigardi la homojn sur la famaj pontoj de Kioto* tiel abstraktaj kiel arboj en densa arbaro; la homoj neniam povas konfuzigi ilin. Ni, kiuj ankoraŭ ne atingis tiun altan staton, devus konstante ekzerci interne kaj ekstere.

Manŝi Kijosaua
(Japana verkisto budhana)

* Kioto = urbo en Japanujo. Iama kaj nuna centro de la japana kulturo kaj Budhismo.

236. Antaŭ Budha-statuo.

Kial vi ridetas, kara Majstro ? Kion vi vidis, kio portas al vi tian serenecon ? Kio estas la sekreto neesplorita, kiu lumigas Vian vizaĝon?

237. La mondo sciis pri Via Doktrino dum dufoje miljaroj kaj kvincent pli, sed tamen la mondo ne komprenas la signifon de Via senombra rideto!

238. Via mieno ĉiel trankvila kaj luma nepre kaŝas menson de neesprimebla profundo! Kaj tamen, tamen ni ja volus kompreni la signifon de Via nepenetrebla rideto!

239. La Budho ridetas, mia filo, ĉar li scias la finon de senfina laciĝo kaj vivmizero. Tio kio gajnita ja gajniĝas, kaj ne perdiĝos. Ĝia frukto estas nepra, - preter ĉi tiu nuntempa doloro.

240. La celo, kiu estas gajnita de Mi, estas ankaŭ certa por vi. Ĝi estas ĉi tiu kiu kondukas al Budha-sereneco.

Kassapa Thero (Cejlona monako)

"Mangala Sutta" (prelego pri benoj)

241. Tiel mi aŭdis:*

Foje la Beatulo restadis en la monakejo de Anathapindikio en la sciura-arbaro apud Savatthi'. Kiam la nokto preskaŭ finiĝis, certa diaĵo aperis kaj eklumigis per sia brileco la tutan sciura-arbaron. La diaĵo proksimiĝis al la Beatulo kaj respektplene salutis Lin, kaj stariĝis ĉe unu flanko. Starante tiel, li alparolis la Beatulon per versoj:-

"Multaj dioj kaj homoj

strebantaj al la bono

kontempladis pri benoj.

Bonvolu diri, kio estas la plej alta beno?"

* "Tiel mi aŭdis. nome Anando, la duon-frato de la Budho. Estis li kiu recitis ĉiujn sutrojn parkere dum la unua monaka konsilaro, mallonge post la morto de la Budho

242. Ne asocii kun malsaĝuloj,
sed asocii kun saĝuloj;
honoru homojn kiuj indas honoron:-
Tio estas la plej alta beno.
243. Restadi en taŭga loko;
bonaj agoj faritaj en la pasinto,
kaj ekpagi sur la prava Vojo:-
Tio estas la plej alta beno.
244. Granda scio, bonega metio,
alte disciplinita edukado,
kaj agrabla parol-maniero:-
Tio estas la plej alta beno.
245. La subtenado de la patro kaj patrino,
la amema-gardado de edzino kaj infanoj,
kaj paca okupado:-
Tio estas la plej alta beno.
246. Malavareco, prava konduto,
helpo al parencoj,
kaj senriproĉeblaj agadoj:-
Tio estas la plej alta beno.
247. Ĉesado kaj sindeteno de la malbono,
modereco rilate al ebriaĵoj
kaj firmeco laŭ virta vivado:-
Tio estas la plej alta beno.
248. Estimo, humileco,
kontenteco, dankemo
kaj oportuna aŭskultado de la Dharmo:-
Tio estas la plej alta beno.
249. Pacienco, obeemo,
vizito al la asketuloj
kaj religiaj diskutoj je taŭgaj momentoj:-
Tio estas la plej alta beno.

250. Memkontrolo, nobla vivo,
perceptado de la (kvar) Noblaj Veroj
kaj la realiĝon de Nirvano:-
Tio estas la plej alta beno.
251. Li, kies menso ne ekscitiĝas
pro la kontakto kun mondaj aferoj,
sed restas sensufera, senmakula kaj sekura:-
Tio estas la plej alta beno.
252. Ili, kiuj plenumas aferojn tiamaniere,
estas ĉie nevenkeblaj,
kaj en ĉiuj rilatoj ili vivas feliĉaj:-
Tiuj estas la plej altaj benoj.
253. La Superega Vojo lavas nenian barilon; ĝi estas kontraŭa nur al prefero.
Hsin Hsin Ming
254. Kredi al la Vero estas kredo.
Jusi (Japanujo)
255. Vere, la Vero estas unika, kaj ne ekzistas alia.
el: Samjutta-Nikajo
256. Al la dioj la homoj estas konataj kiel malpuraj, malbonodorintaj, abomenaj. La
dij fuĝas la odoron de homoj je distanco de pli ol cent mejloj.
el: Digha-Nikajo
257. Ekzistas, ho Fratoj kvar aĵoj pri kiuj neniu povas havi influon, nek asketulo
nek brahmano, nek dio nek diablo, nek Brahmo, nek iu ajn en la mondo,
nome: ke tio kio estas destinita al maljuniĝo, ne maljuniĝo; ke tiu kiu estas
destinita al malsano, ne mlsaniĝo; ke tiu kiu estas destinita al morto, ne
mortu; ke malbonaj agoj kondukantaj al nova naskiĝo, maljuniĝo kaj morto,
ne maturiĝo.
el: Anguttara-Nikajo
258. Pri kio, ho Sinjoro Gotamo estas la menso de la asketuloj okupata, al kio ili
strebis, kio estas ilia subteno, ilia aspirado kaj ilia celo?
La asketuloj, ho brahmano, okupas siajn mensojn pri la pacienco kaj
bonvoleco kaj ili strebas al saĝeco, la pureco de la menso estas ilia subteno; al
la Ne-IOeco ili aspiradas kaj Nirvano estas ilia celo.
el: Anguttara-Nikajo

259. Se konfuzita homo eĉ recitas grandan parton de la Sanktaj Skribaĵoj, sed ne vivas laŭ la instruoj, li estas simila al iu bovin-paŝtisto kiu kalkulas la bovinojn de aliuloj; li ne partoprenas en la vivado de monako.

260. Se homo eĉ nur recitas etan parton de la Sanktaj Skribaĵoj, sed entute komprenas la Dharmon kaj obeas ĝin; se li detruis pasiojn, malbonvolecon kaj maldiligentecon kaj korekte komprenas la Dharmon; se li havas klaran menson, kaj jam forlasis alligon al io ĉi tie sur la tero aŭ en la sekvonta mondo,- tia homo estas partoprenanto en la vivado de monako.

el: Dhammapado

Ge-jor-dum pa (La religiaj deziroj)

261. Tiu ĉi "preĝo" devas esti recitata en senmemeca spirito kaj pura altruismo, kredante ke ĉiuj Guru-oj kaj la TRIKAJO* aŭskultas kaj aprobas la "preĝon" donante ilian benon.

Pro mia propra merito kaj tiu de ĉiuj vivantaj estaĵoj, gajnita en la tri tempoj, estu renaskota en ĉiuj miaj estontaj vivoj kiel libera kaj bondolotita homa estaĵo (kiu estas altvalora donaco).

* Trikajo = la tiel nomataj tri "Korpoj" de la Budho.

1. Dharmakajo = la Budho kiel la personigita Leĝo.

2. Sambhogakajo = La Budho kiel celesta estaĵo.

3. Nirmanakajo = La Budho kiel surtera estaĵo.

262. En ĉiuj miaj estontaj vivoj mi estu unu el la unuaj inter tiuj kun granda kredo. Estu mi la ĉefa inter la humilaj. Estu mi ĉefa inter la energiaj kaj inteligentaj; ĉefa inter tiuj kun altaj aspiradoj kaj vasta scio!

263. Estu mi la ĉefa inter la kompatuloj, ĉefa inter la komprenantoj, ĉefa inter la persistantoj kaj ĉefa inter la peze-laborantoj!

264. Estu mi posedanto de menso bone edukita en ĉiuj branĉoj de scienco, kiu estas propraĵo de mia menso. Ĉiam mi renkontiĝu kun kleruloj kaj profesoroj de La Mahajano*, baldaŭ post mia naskiĝo.

* Mahajano = la granda veturilo (al la Nirvano)

Norda Skolo budhisma.

265. Ĉiam mi estu kapabla lerni kun pura menso, praktiki kaj obei ĉiujn branĉojn de la Dharmo kvazaŭ ili estus unu tuto. Estu mi ĉiam kapabla teni la promesojn kaj disciplinon pure kaj strikte.

266. Estu mi al kutimita senti kompaton kaj meditadi pri la Ŝunjato* (Malpleneco). Estu mi kapabla atingi mian propran kaj la celojn de aliuloj. Akiru mi dia-inspiradon.
- * Ŝunjato = "Malpleneco ". Norda budhisma dok-trino pri la esenca malpleneco (ne-realeco) de ĉio kio ekzistas.
267. Ĉiuj bonaj aŭ malbonaj cirkonstancoj estu helpaj sur la vojo al Budheco. Pro la merito de tiuj ĉi deziroj kaj pro la potenco de granda intelekto, mi realigu la Eternan Veron.
268. Pro mia universala kompato, mi ne estu sendiferenca al la malfacilaĵoj kaj mizeroj de aliuloj. Pro granda scio, mi estu kapabla enplanti scion aŭ saĝecon en la korojn de aliuloj. Pro granda sperto, mi estu kapabla gvidi aliulojn sur la Vojo.
269. Pro scio mi liberigu, pro graco mi estu kapabla savi aliulojn. Estu mi saĝa en kombini cirkonstancojn. Estu mi libera kiel la Spaco de fiksitaj asertoj kaj dogmoj aŭ kredoj.
270. Estu mi kapabla rigardi mian Guru-on kun la sama respekto kiel mi respektus iu ajn Budho. Kaj pro la merito de tiu ĉi virto, mia kredo neniam malvastiĝu. Nenia rompo okazu en mia kredo, kaj mi ĝuu spiritan kuniĝon kun mia Guru'.
271. La graco, saĝeco kaj virto de la Budho kaj Guru' konstante instigu min. Miaj eraroj estu forigitaj kaj ĉiuj virtoj perfektigitaj. Mia koro estu plena kun la penso pri "ne-bezono".
272. Mi rekonu aliulojn kiel egalaj kun mi. Estu mi kapabla interŝanĝi feliĉon kun malfeliĉo. Estu mi kapabla ŝuldrigi la zorgojn kaj dolorojn de aliuloj, ĝoje kaj feliĉe. Havinte ŝuldrigitaj ili, estu mi kapabla ilin porti sen grumbli.
273. Tiuj inter miaj amikoj kiuj en pasintaj viv-statoj helpis min sur la prava Vojo, akiru ĉiujn virtojn de Budho kaj Budhecon.
274. Mallonge, ĉe la potenco de ĉi tiuj meritoj, fariĝu mi egala, en ĉiuj rilatoj, kun mia Guru', dioj, sanktuloj, joguloj ktp. inkludante eĉ la Budhojn kaj Bodhisatvojn kiuj ekzistis, ekzistas kaj ekzistos on la tri tempoj.
275. Estu mi simila al ili laŭ korpo, parolo kaj menso; laŭ sukcesoj aŭ virtoj, kaj laŭ agoj; laŭ viv-daŭro ankaŭ. Estu mi simila al ili laŭ saĝeco kaj scio; laŭ aspiradoj kaj kuraĝo; laŭ graco kaj antaŭ-scio kaj laŭ la amaso de faritaj laboroj.

Lama' Choje Tsang-pa (tibeta monako)
mallongita el: An Introduction into Lamism,
the mystical Buddhism of Tibet (de la sama aŭtoro)

276. Bonuzu vian tagon,
en etaj aŭ grandaj agoj.
Kun ĉiu tago, kun ĉiu nokto -
via viv-tempo mallongiĝas-
iranta aŭ restanta,
sidanta au kuŝanta,
via lasta horo certe batos -
la tempo estas mallonga
kaj nekonata.

el: Theragatho

277. Nek iu ajn dio nek spirito, nek Budho nek Bodhisatvo punos vin pro viaj malbonagoj; sed, estas vi mem kiu estas la propra juĝisto kaj ekzekutisto. Ĉiam memoru la antikvan saĝan proverbon: "Kion vi semis, vi devas rikolti."
Bhikŝu Anuruddha (Vjetnamio)

278. Ĉar mi forlasis miajn parencojn, mi estas feliĉa;
Ĉar mi forlasis alligon al mia lando, mi estas feliĉa;
Ĉar mi ne estas ligta al tiu ĉi loko, mi estas feliĉa;
Ĉar mi ne portas la ceremoniajn robojn de la pastroj, mi estas feliĉa;
Ĉar mi ne estas katenita nek al domo nek familio, mi estas feliĉa;
Mi ne bezonas ĉi tion aŭ tion, tial mi estas feliĉa.

279. Ĉar mi posedas la grandan riĉaĵon de la Dharmo, mi estas feliĉa;
Ĉar mi ne zorgas pri propraĵoj, mi estas feliĉa;
Ĉar mi ne bezonas timi perdon, mi estas feliĉa;
Ĉar mi neniam timis ellaciĝon, mi estas feliĉa;
Pro la fakto ke mi ne bezonas perforte komplezi miajn subtenantojn, mi estas feliĉa;
Ĉar mi ne bezonas fari aranĝojn por io, mi estas feliĉa.

280. Ĉar ĉion kion mi faras akordas kun la Dharmo, mi estas feliĉa;
Neniam dezirante iri ien ajn, mi estas feliĉa;
Ĉar la penso pri morto ne kaŭzas timon al mi, mi estas feliĉa;
Banditoj, ŝtelistoj kaj rabistoj neniam ĝenas min, pro tio mi estas feliĉa la tutan tempon!

281. Gajninte la plej bonajn kondiĉojn por la praktikado de la Dharmo, mi estas feliĉa;

Ĉesinte de ĉiuj malbonagoj, mi estas feliĉa;
Irante la vojon de merito, mi estas feliĉa.
Ho, mi havas multe da feliĉo kaj ĝojo!

Jogulo Milarepo

282. Same kiel nur iomete de koto kaj puso malbonodoras - tiel ankaŭ nur iomete da estiĝo en iu ajn viv-formo estas malbona.

283. Same kiel rusto deveninta de la fero sin mem formanĝas, tiel la homo pro siaj propraj malbonagoj iros al malfeliĉaj viv-statoj.

284. Iu ajn, kiu per bonaj agoj kovras la faritajn malbonagojn; tia homo eklumigas la mondon kiel la luno libera de nuboj.

285. Ne ekzistas malbono, kion la mensoginto ne kapablu fari, li kiu ofendis la Leĝon de Vereco kaj estas indiferenta pri la sekvontaj viv-statoj.

286. Vere, avaruloj ne iros al pli bonaj viv-statoj, malsaĝuloj ne laŭdas malavarecon. La saĝulo ĝojas pri donemo, kaj poste atingos feliĉan viv-staton (renaskiĝon).

kvin stancoj el: Dharmapado

287. Feliĉiga la soleco de tiu, kiu praktikas la Dharmon kaj kun ĝojo en la koro kontemplas la vizion.

288. Feliĉiga tiu kompatemo al la mondo, kiu neniel malutilas al la estaĵoj.

289. Feliciga la foresto de ĉiu deziro, feliĉiga la supreniĝo transen de la sentavido.

290. Li kiu detruas la despotan penson "Mi estas", vere la superan beatecon jam konas.

el: Vinajo

291. Pli bone ol mond-regado,
pli bone ol iri al ĉielo,
pli bone eĉ ol la regado de la universo,
estas la frukto de tiu homo kiu eniras la riveron. (tio estas la ekkomenco de la Vojo kondukanta al Nirvano).

el: Dhammapado

292. Ĝuste tiel, kiel la vasta oceano havas nur unu guston, nome la guston de salo, tiel ankaŭ la Dharmo havas nur unu guston, nome la guston de liberiĝo.

el: Udano

293. Tiun, de kiu vi estas kondukata al kompreno de la Dharmo klarigita de la Budho, respektu kun omaĝo, kiel bramano omaĝas la sanktan fajron.

el: Dhammapado

294. Bonvena estu al mi komprenanta homo; ne la pretendanto kaj flatanto, sed honesta homo. Sekvante la Tathagaton li baldaŭ rimarkas, ke oni liberiĝos entute de la kateno, nome de la kateno de ne-scio.

el: Maĝhima-Nikajo

295. La Doktrino (Dharmo) de la Budho povas esti komprenata de ĉiuj homoj, eĉ de la plej simplaj ĉar ĝi estas la vero pri ni mem...

Georg Grimm,
fama germana Budhologo kaj fondinto
de la 'Altbuddhistische Gemeinde',

296. Manko de konfido estas peza ŝarĝo, ĝi kaŭzas suspektemon; sed la konfido bazita sur kredo sole estas eĉ pli riska. Konfido bazita sur kompreno rezultiĝos en facilanimeco kaj ĝojo.

Njanatiloka Mahathero,
germana budhana monako kaj verkisto

297. Eĉ en la vivo de sincera budhano, monako aŭ laiko egale, povas veni tempo de krizo, tempo de dubemo pri la valoro vivi laŭ la Nobla Okera Vojo kiel ĝi estis montrita de la Budho. Sed, se oni nur iomote atenteme ĉirkaŭ-rigardas kaj ekzamenas sian propran internon, tiam oni sendube trovos, ke ne ekzistas io pli nobla, pli racia, pli aktuala kaj pli helpa al nia persona evoluiĝo, persona feliĉo kaj persona liberiĝo ol ĵus la Budha-Dharmo.

298. Ekzamenu kaj studu - se vi sentas la urĝon - aliajn filozofiojn kaj religiojn; sed poste vi certe eltrovos, ke nenia sistemo estas supera al la Doktrino de la Budho. De tiu momento, vi eble estas fortigita kontinui pli energie sur La Nobla Okera Vojo. Konstruanta dubo ne estis kondamnita de la Beatulo, sed la obstina, malkonstruanta dubo kaj la dubo pro antaŭjuĝo kaj pro principo, estis severe riproĉata de Li. Gardu vin kontraŭ la malkonstruanta dubo!

Lama Dorje Gja tsen

299. Avido, kolero kaj iluzio kiuj estiĝas en homo kun malbonaj pensoj, detruos lin same kiel herbaĵo la propran frukton.

el: Itivuttako

300. Ni devas scii, ke la Sinjoro Budho deklaris, ke malamo ne povas ĉesi per malamo, sed per bonvoleco. Tial ni klopodu disvastigi bonvolecon se ni volas alporti mond-pacon.

Dhammadassi Thero (cejlona monako)

301. Se vi volas scii kio estas vera Budhismo, scii la originan doktrinon de la Budho Gotamo tiam vi devus antaŭ ĉio studi la fundamentajn doktrinojn de diversaj sektoj kaj kompari ilin kun la Instruoj de la Budho. Se vi trovos, ke tiu aŭ tiu ĉi sekto enhavas la Kvar Noblajn Verojn pri la universala suferado, kaj la Okeran Vojon kondukanta el la suferado, kaj ankaŭ la Dekdu Interdependantajn kondiĉojn, tiam vi povas esti certa, ke oni sekvas veran Budhismon. Sed se vi eltrovos, ke tiu aŭ tiu ĉi sekto ne enhavas la Kvar Noblajn Verojn pri la universala suferado, nek la Noblan Okeran Vojon, nek la Dekdu Interdependantajn Kondiĉojn, tiam vi povas esti certa, ke oni ne sekvas Budhismon kiel ĝi estis proklamita de la Budho Gotamo, sed falsajn doktrinojn sub mantelo de Budhismo.

302. Estas tute erara juĝi Budhismon laŭ ceremonioj, ritoj, roboj, orden-sistemoj, medidad-metodoj; ĉu kapo de monako estas glate razita aŭ ne, ĉu li portas la flavan (originan) robon aŭ brunan, ruĝan aŭ eĉ nigran. Nenia ekstera formo estas grava kaj necesa, gravas sole la Doktrino kaj ĝia ĉiutaga aplikado. Oni memoru, ke la Budho mem ne entute razis sian kapon, ĉiu Budha statuo montras Lin havanta sufiĉe multe da hararo! Same oni ne tro pensu, ke senedziĝa stato estas la perfekta vojo al saviĝo; la Budho mem neniam eksedziĝis, kontraŭe, la libroj rakontas, ke Jasodaro, Lia edzino, fariĝis monakino kaj Lia filo Rahulo monako kaj ili vivis kun Li kaj la ceteraj, gemonakoj.

Bhikŝu' Mahanamo (Hinduĵo)

303. La Instruo de la Budho taŭgas por ĉiu intelekto, popolo, aŭ raso. La Budho kreis mond-religion kaj ne religion de iu tribo. Se Budhismo estus reginta en la Okcidento, tiam la homaro neniam estus spertinta religiajn (sangajn) persekutadojn, inkvizicion, religiajn militojn (kruc-militon) nek la Tridek-jar'militon en Eŭropo, nek la unuan kaj duan mondmilitojn kaj antaŭ ĉio, nenia Hitler kaj similaj diktatoroj estus kapablaj enflamigi homojn al genocidoj.

Malofte oni pensas aŭ skribas pri tiaj faktoj. Sinjoro Nehru iam diris ke estas sole Budhismo kiu povas alporti mond-pacon. La Dharmo de la Budho, en ĝia pureco, estas tutcerta konkeri pace la Okcidenton, ĝi jam venis al Eŭropo kaj nun havas firman bazon, ne plu forigeble!

Bhikŝu' Anuruddha (Hinduĵo)

304. Venku malamon per amo,
Venku malbonon per boneco,
Venku la avarulon per donemo,
Venku mensogulon per la vero!

305. Ne pensu facilamime pri la malbono, dirante; tio ne multe gravas al mi: eĉ malrapide falantaj akvo-gutoj povas pleniĝi ujon; en la sama maniero la stultulo pleniĝas kun malbono.

du stancoj el: Dhammapado

306. Fratoj ! Troviĝas jenaj kvar specoj de homoj en la mondo: Unue la persono kiu iradas kun la rivero, due la persono kiu iradas kontraŭ la rivero, trie la persono kiu havas memdisciplinon, kaj kvare la brahmano, kiu transpasis, iradis malantaŭen kaj staras sur seka grundo. Kaj kiu, ho Fratoj, estas li, kiu iradas kun la rivero? Laŭ tio, certa homo indulgas en sens-plezuroj kaj faras malbonagojn. Kaj kiu, ho Fratoj, estas li, kiu iradas kontraŭ la rivero? Laŭ tio, certa persono ne indulgas en sensplezuroj kaj ne faras malbonagojn; sed kun sufero, lamentado, kaj larm-plena vizaĝo, li faras noblajn agojn, per kiuj li sin purigas. Kaj kiu estas li, kiu havas memdisciplinon? Laŭ tio, certa persono, kiu per la detruo de la kvin katenoj kiuj ligas lin al ĉi tiu mondo leviĝas al spontana alteco kaj atingas Nirvanon, kaj ne estas devigata reveni al ĉi tiu mondo. Kaj kiu, ho Fratoj, estas li, kiu transpasis, iradis malantaŭen kaj staras sur seka grundo? Laŭ tio, certa persono, konstatas pro la detruo de la ŝanĝaĵoj, kaj per sia propra super-scio la liberecon de la koro kaj la liberecon de la saĝeco, kiu estas senŝanĝa, kaj li restadas en tiu stato. Tiuj, ho Fratoj, estas la kvar specoj de homoj, kiuj troviĝas en le mondo.

el: Anguttara-Nikajo

307. Kelkaj homoj pensas ke Budhismo estas malluma kaj melankolia religio; sed tio ne estas tiel; kontraŭe ĝiaj sekvantoj fariĝas saĝaj kaj ĝojaj. Se ni legas la naskiĝ-rakontojn de la estonta Budho, ni sciiĝas kiel li kulturis en si la perfektigon de pacienco kaj pardonemo. Tiaj rakontoj povas esti helpo al ni por resti ĝojaj eĉ en la mezo de gravaj malfacilaĵoj, kaj ĝoji pro la bonfarto de aliuloj.

Njanatiloka Mahathero (germana monako)

308. Se oni dirus, ke li ne volas ekpaŝi la Noblan Okeran Vojon ĝis la Beatulo unue estus dirinta al li: ĉu la mondo estas eterna, aŭ dumtempa, limigita aŭ ne limigita; ĉu la Perfektulo ekzistos post la morto aŭ ĉu Li ne ekzistos ktp. - tia homo mortus antaŭ ol la Perfektulo povus ĉion klarigi al li.

Jong Hoontrakil (Thailando)

309. Estas kvazaŭ viro estus trapikita de venenigita sago, kaj liaj amikoj alvokus kuraciston; kaj tiu viro estus dirinta: "mi ne permesas, ke oni eltiru la sagon antaŭ ol mi scias kiu li estas, kiu min vundis: 'ĉu li estis noblulo, princo, civitano aŭ servanto?' aŭ: 'kian nomon li havas kaj al kiu familio li apartenas?' 'ĉu li estas alta aŭ malata, aŭ de mezalteco?' Vere, tiu viro mortus antaŭ ol li povus adekvate lerni pri ĉi ĉio.

el: Majjhima-Nikajo

310. Pro tio, la homo, kiu serĉas sian propran bonfarcon, devus eltiri tiun ĉi sagon - tiun sagon de lamentado, doloro kaj suferado.

el: Nipado-sutro

311. Ĉio ŝanĝas, ĉio pasas,
aĵoj aperas, aĵoj malaperas,
sed, se ĉio estas finita -
ĉio aperis, ĉio malaperis,
estado kaj estingo transcendiĝis -
tamen, la fundamenta Malpleneco*
kaj la silentado restas;
tio estas la Beata Paco.**

Gotama Budho

* Malpleneco, en Sanskrito: 'Sunyata'; esperante: ŝunjato.

** Beata Paco, en Sanskrito: 'Nirvana'; esperante: nirvano.

Klarigoj pri kelkaj budhismaj terminoj

En tiu ĉi libro nur tre malmultaj terminoj el la Pali kaj Sanskrita lingvoj estas uzataj, ĉiuj jam bone konataj al budhanoj. Je la bono de Esperantistoj kiuj ankoraŭ ne konatiĝis kun la budhisma filozofio, mi donos la klarigojn:

Buddha estas termino el la Sanskrita lingvo, sed sama ankaŭ en la Pali, kaj ĝi signifas "La Enlumiĝito". En la du hindaj lingvoj la vorto Buddha estas elparolata kiel Bud-dha, kaj ĉar dha estas malfacile elparoli al multaj aliaj homoj, pro tio ĝi devas esti elparolata en Esperanto kiel Bud-ho, kaj ne kiel Bud-o aŭ eĉ Buda-o, kiu estas tute erara malgraŭ la ekzistantaj vortaroj. Estas konsilinde, ke la verkistoj aŭ kompilantoj de vortaroj finfine ĉesu sklave imiti la erarojn en la Plena Vortaro kaj aliaj!

Dharma estas pure Sanskrita vorto, en Pali ĝi estas skribita Dhamma. Dharma havas multajn signifojn, i.a. Leĝo, Devo, Religio, sed budhanoj komprenas ĝin kiel la religio aŭ filozofio de la Budho.

Tathagato apartenas al ambaŭ Sanskrito kaj Pali lingvoj kaj signifas laŭ sence "Li kiel tiel venis kaj iris", opiniante "venis kaj iris kiel la antaŭaj Budhoj", ĉar la historia Budho Gautama (en Pali Gotama) neniam deklaris ke li estas la sola Budho aperinta en la mondo. Suda Budhismo, la tiel nomata Theravada havas liston de 24 antaŭaj Budhoj, sed la listo de la Norda Budhismo, la tiel nomata Mahajana Skolo havas longegan liston de Budhoj kaj Bodhisatvoj. Bodhisatvo signifas estaĵo kiu sin preparas tra multaj renaskiĝoj iam mem esti budho.

Nirvana, en Pali Nibbana, estas tre malfacila termino, pere de ĝi oni volas priskribi la superan staton kiu budhana Sanktulo, inkludante la Budhon atingis; sed ne sole post la morto, sed dumvive. Nirvano signifas i.a. plenplena liberigo de ĉiuj memecaj deziroj, pasioj kaj sopiroj; sed ĝi ankaŭ signifas la certecon, ke post tiu ĉi vivo ne plu ekzistos alia vivo en iu ajn formo. Nirvano estas la liberiĝo de la Rado de Vivo kaj Morto.

Samsara elparolita kiel sangsara en Esperanto. Sangsaro estas la Rondo aŭ Rado de la Vivo kaj Morto de kiu budhanaj Sanktuloj, nomataj Arahatoj, sin liberiĝis. -

REKOMENDINDA BUDHISMA LITERATURO

En Esperanto

Antaŭ kaj post la dua mondmilito la Budhana Ligo Esperantista kaj la Japana Ligo Esperantista eldonis revuojn kaj libretojn kiuj nuntempe preskaŭ estas elĉerpitaj. Ankoraŭ haveblaj estas:

BUDHANA KURIERO, organo de la Budhana Ligo Esperantista, Rue des Fagnes, 19, B-4131 AWIRS, Belgio.

Ekrigardo al Budhismo de D-ro L. Soni (Birmanio), havebla ĉe la Universala Esperanto Asocio (UEA), Rotterdam, Nederlando.

Budhisma Katekismo de Subhadra Bikŝuo, havebla ĉe la Budhana Ligo Esperantista.

En la franca lingvo

La religion du Bouddha par Georg Grimm, chez ANDRIEN MAISON-NEUVE, II, Rue Saint Sulpice (6) PARIS.

En la angla lingvo

The Doctrine of the Buddha by George Grimm, can be ordered from Altbuddhist. Gemeinde, Utting a/ Ammersee 8919 West-Germany.

En la germana lingvo

Die Lehre des Buddha, von Georg Grimm, bestellbar durch: Holle-Verlag, Baden-Baden, oder durch die Altbuddhist. Gemeinde.

Georgo Grimm skribis multajn verkojn pri la origina Budhismo. Interesataj personoj turnu sin al la supre menciita Altbuddhist. Gemeinde. La Pali Text Society, Londono, jam eldonis preskaŭ la tutan Tripitakon en Pali kaj angla lingvoj. Oni turnu sin al: Pali Text Society, 30, Dawson Place, London, W.C.I.

Ni nur menciis kelkajn gravajn verkojn, sed multmiloj aliaj ekzistas jam en eŭropaj lingvoj, tro multe por menciigi ĉi tie.

Pacon al ĉiuj estaĵoj !